

Pri **de** kaj **da** laŭ la fontoj.
(Ĉerpado kaj komentoj fare de ordinara parolanto)

Antonio Alonso Núñez (Hispanio)
nunjes@telefonica.net

(A) Ĉi paĝaro aperas per du malsamaj alfabet-aranĝoj en respektivaj apartaj dokumentoj, nome, per la fundamenta ĉapel-alfabeto, kaj [[farante en tiu alfabeto la ŝanĝojn ĉi-apude montratajn]].

ĉ → q	ĥ → hh
ĝ → y	ĵ → jh
ŝ → x	
ŭ → w	

Krome, en ambaj versioj estas uzataj kelkaj mallongaj formoj (*un*, *anke*, *ktp*) kiuj, eĉ se ne oficialaj, estas tamen foje uzataj en iuj verkoj, web-paĝoj kaj konversacio.

Rim.— Legu en mia <http://hdl.handle.net/11013/2795> pri du *qwxy*-proponoj, nome, tiu ĉi-apuda mia, kaj aliu (pli frua kaj pli kompleksa) de L. Canepari. •

.....

(B) Antaŭ kelkaj tri monatoj mi ekhavis la ideon, kolekti en un solan paĝaron ĉion, kiun niaj bazaj fontoj diras pri la kontrastoj inter la prepozicioj **de** kaj **da**, kiel anke komenti ties diversajn erojn laŭ vidpunkto de ordinara parolanto (kiu ja estas la sola vidpunkto pri kiu mi povas min taksu pli-malpli kompetenta).

-- Nu, tian ideon mi efektivigis, kaj jen ĉi tie la rezulto de la farita laboro.

.....

(C) Duopaj rektaj krampoj, [[...]], enfermas miajn komentojn, kiel anke aldonajn ekzemplojn de mi konstruitajn.

-- Du asteriskoj enfermantaj esprimon (kiel en **Mi havas libro**) indikas, ke tiu esprimo estas erara. (Ĉe tio, kunteksto informas pri la kialo de la erareco).

-- Kvankam tio ja ne okazas en la fontoj, jen mi uzas kolorajn literojn por distingado difinitajn gravajn vortojn (**de**, **da**, **la**, k.s.).

Koloroj estas uzataj anke kiel fono de iuj tabeloj aŭ tabel-ĉeloj por indiki ke ilia enhavo estas grava, aŭ por distingi la diversajn partojn de donita tuto.

-- Ruĝa maneto "👉" ja montras al partoj kiujn mi ial konsideras speciale gravaj.

.....

(D) Mallongigoj uzataj:

- E = Esperanto/a/e.- Z. = Zamenhof, zamenhofa.
- A, F, G, H, P, R = Angla, franca, germana, hispana, pola, rusa.- (Anke *france*, *ktp*)
- FE (ApF, G5, EKZ, UV) = Fundamento de E (Antaŭparolo al FE, Gramatiko en kvin lingvoj, Ekzercaro, Universala Vortaro).
- PGE = Plena Gramatiko de E. (La 16 reguloj, en E).
- UL, (DL, ApD, AID) = Unua Libro, (Dua Libro, Antaŭparolo al DL, Aldono al DL).

- (LR, ApR), PE = (Lingvaj Respondoj, Antaŭparolo al LR), Proverbaro Esperanta.
- Bib, BibX, BibN = Malnova Testamento (traduko de Z.), Malnova Testamento (temas pri Bib reviziita de brita pastraro), Nova Testamento (traduko de tiu brita pastraro). [*] [**] [***]
- Bo, Re = Letero al Borovko, La Revizoro.
- Fa = La Faraono (traduko de Bein).
- PV, PIV = Plena Vortaro de E (1930/1934/1996), Plena Ilustrita Vortaro de E (1970, 1987, 2002, 2005)
- PG, PAG = Plena Gramatiko de E (1935. 1938, 1958), Plena Analiza Gramatiko de E (1980, 1985).
- PMEG = Plena Manlibro de E Gramatiko.
- RV = Reta Vortaro.
- Vik, Wik, Int = Vikipedio, Wikipedia, Interreto.

[*] En la Interreto disponeblas Bib kaj BibN, sed ne BibX.

[**] Laŭ Vikipedio: Z. konfidis la finpretigon de sia Bib al brita komitato, kaj de tio venas BibX.– Laŭ interna pritakso, tiu BibX estas "pli zamenhofa ol Zamenhof mem".– Jam PV abunde citas el ĝi kaj uzas ĝin kiel modelan referenc-verkon pri "ĝusta kaj imitinda" Esperanto.– En PIV ĝia modela karaktero eĉ fariĝis pli granda.

[***] La bibliajn ekzemplojn PIG ĉerpas el BibX, kaj RV el Bib.

Rim.– [i] Ĉiuj verkoj, krom PAG, estis konsultataj de mi en la Interreto.

La facila serĉado en Interreto, kiel anke la simpleco de la komputil-manovro "kopii kaj alglui" ebligas, ke eĉ ordinaruloj provu ekreti la terenon de niaj lingviko-fakuloj. •

[ii] Preske ĉiujn ekzemplajn frazojn mi ĉerpis el tiuj en PAG, PIV kaj RV. Nur kelkajn ekzemplojn mi serĉis en la originalaj verkoj aŭ konstruis mem.

Ĉe citado ekzemplajn frazojn, PAG kaj PIV indikas la aŭtoron per supreskribitaj inicialoj (Ĵ, Ŝ, k.s.).– RV, tre pli riĉe kaj efikece, ĝenerale indikas la titolon de la fontoverko kaj ties aŭtoron, ofte anke la ĉapitron kaj alineon. •

(1) Baze pri **de**:

- [[Mia traduko]] de la koncernaj nacilingvaj [[preskribaj]] eksplikoj de la kvinlingva UV:

La E prepozicio **de** respondas [ĝenerale, ja ne ekzakte] al la prepozicioj F *de*, A *of / from*, G *von*, R *отъ (от)*, P *od*, [H *de*], kaj anke anstatas la deklinaciajn genitivojn de G, R, P.– [Deklinaciaj genitivoj ja ne ekzistas en E, F, A, H].

[[Tio estas tro konciza preskribo, ĉar tiuj prepozicioj kaj tiuj genitivoj estas ofte tradukendaj per E prepozicio alia ol **de** (i.a. per la E prepozicio **da**, por kiu ne ekzistas rekta ekvivalento en tiuj naciaj lingvoj)]. (Vidu (2)).

[Tiuj nacilingvaj prepozicioj kaj genitivoj, siavice, ne estas plene koincidaj inter si, kaj havas eĉ tre multajn diversajn signifojn pri posedo, aparteno, origino, aganto, ktp].– [Anke la E **de** estas, tial, multsignifa].

- Laŭ PGE, 6: La prepozicio ĉe la pasivo estas **de**.

Ekzemplo: *Ŝi estas amata de ĉiuj* [[responde al aktiva *Ĉiuj amas ŝin*]].

• El EKZ.32: *Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis [troviĝis] vino, aŭ kiun oni uzas por vino.* [[Sinonime direblas "vin-glaso = vinglaso", vidu (5.1).Rim]].

.....

(1.1) Jen kelkaj ekzemploj el EKZ, elektitaj laŭ diversaj signifo-nuancoj de la prepozicio *de*:

- *Jen kuŝas la ĉapelo de la patro.*
- *La dentoj de leono estas akraj.*
- *Januaro estas la unua monato de la jaro.*
- *La alteco de tiu monto ne estas tre granda.– [[Monto de ne tre granda alteco]]*
- *Du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo.*
- *En la poŝo de mia pantalono mi portas monujon.*
- *Ekzerco de legado.*
- *[[Tiuj estis por mi jaroj de sufero]].*
- *Mia frato ... estas de meza kresko.– [[Mia frato estas knabo de meza kresko]].*
- *Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo.*
- *For de tie ĉi!*
- *Kiam malriĉa virino petos de vi trinki ...*
- *Mi de teruro ne sciis, kion fari.*
- *Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi.*
- *Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi.*
- *... konstruota en la daŭro de du jaroj.*
- *En la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis du pafojn.*
- *Tri estas duono de ses. [*]*
- *Un tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro.*
- *[[Mi revenos post kvarono da horo]]. (DL) [**]*

.....

[*] (1.1.1) [[Laŭ ĉi ekzempla frazo ni havas anke]]:

-- *Tri estas duono de | unu duono de | la duono de ses.– Tri pomoj estas la duono de ses pomoj.– Mi aĉetis tri pomojn, t.e., mi aĉetis la duonon de ses pomoj.*

-- *Ses estas duoblo de | la duoblo de tri.– Ses pomoj estas la duoblo de tri pomoj.– Mi aĉetis ses pomojn, t.e., mi aĉetis la duoblon de tri pomoj.*

.....

[] (1.1.2)** [[Ĉi frazo aperas anke en (2.5)]. [[Kadre de PAG/PIV, la ĝusta formo estas *Mi revenos post kvarono de horo* (ja analoge al tiu 336-ono de jaro)]]].

.....

(1.2) Jen ekzemploj laŭ *Glaso de vino* en la lasta ĉelo de (1).

(Pri tiu *da*, vidu (2)).

- *Uranio kaŝita en vinboteloj.* (Int).
- *Mi eltrinkis tutan botelon da vino, kvankam ĝi ne tre plaĉis al mi, ĉar la vino estis bona, sed la botelo estis de brando.* (DL). [*]
- [*] [[Supozeble, la vino havis kromguston je brando]].

-- Tia uzo de la prepozicio *de* doniĝas anke en H: *Vaso de vino / Vaso para vino = Glaso de vino / Glaso por vino* (kvankam H *de* estas preferata por ĉi senco).

(2) Baze pri *da*.

- [[Mia traduko]] de la nacilingvaj [[preskribaj]] eksplikoj de la kvinlinga UV: [*]

La E prepozicio da estas uzata post vortoj esprimantaj mezuron, pezon, nombron, [[kvanton]].


- *Da post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro.* (EKZ.32)

- *Glaso da vino estas glaso plena je vino.* (EKZ.32) [plena je/de/per vino].

- LR.16 enhavas [[tre gravan]] precizigon pri la signifo de *da*.– Vidu (4.2.7).

• En neniu el la kvin naciaj lingvoj rolantaj en FE [anke ne en H] ekzistas rekta ekvivalento por la E prepozicio *da*: Por ties signifo, en F, A, H estas uzataj la prepozicioj *de*, *of*, *de*, kaj en G, R, P estas uzata genitivo (t.e., rimedoj kiuj estas uzataj anke por E *de*).


[*] Tiun preskribon akompanas nacilingvaj kaj E ekzemploj, kiujn vidu en (2.1).

 **Rim.**– [i] [[Mi konas nenium informon, ĉu la E prepozicio *da* estas imitita aŭ iel inspirita de iu(j) lingvo(j), aŭ ĉu ĝi estas originala ideo de Z. (tiel ke, ŝajnas, do, li neniam parolis pri la afero, kaj ke neniu pridemandis lin). (Vidu (11)).

PIV ĝin nomas partitiva prepozicio, samfamilia al la R partitiva genitivo kaj al la F partitiva artikolo.

[ii] [[Pri la kontrasto kaj [[sendanĝeraj]] kolizioj inter la prepozicioj *de* kaj *da* doniĝis kaj doniĝas debatado inter gramatikistoj.– PAG kaj PIV sin tenas al la evoluo de ties uzado ĉe la plej bonaj aŭtoroj, kun plioftiĝo en la uzado de *de*.– RV, siaflanke, sin tenas al propra skemo, kun plioftiĝo en la uzado de *da*]]. (Vidu (3.1)).

[[Nu, tiaj gramatikistaj diferencoj finfine rilatas nur al diferencoj de stilo, kaj ne al diferencoj semantikaj, kaj ili tial neniel ĝenas la interkomprenon. (Pri ĉio ĉi ja temos detale en la sekvaĵo)].•

 [iii] [[Mi anticipe diru, ke ĉi paĝoj pli ol abunde konfirmas al mi mian tre malnovan opinion, ke *da* estas lukseta kaj kaprompa prepozicio, kies utileco estas tre pli pridubinda ol tiu de *la* artikolo]].– [[Ĉe la aserto el la komenca tempo de E, ke la artikolo estas oportuna sed ne necesa (EKZ.27), nu, ĉu kion pensi pri *da*?]].– (Vidu (13)).•

(2.1) Jen la nacilingvaj kaj E ekzemploj en UV pri uzado de *da* (plus la responda H ekzemplo):

<i>viande</i>	<i>thé</i>	(un) kilo(gramme) <i>de</i> viande	(un) verre <i>de</i> thé
<i>meat</i>	<i>tea</i>	(a/one) pound <i>of</i> meat	(a/one) glass <i>of</i> tea
<i>carne</i>	<i>té</i>	(un) kilo(gramo) <i>de</i> carne	(un) vaso <i>de</i> té
<i>мясо</i>	<i>чай</i>	[один] килограмм <i>мяса</i>	[один] стакан <i>чая</i>
<i>mięso</i>	<i>herbata</i>	[jeden] kilogram <i>mięsa</i>	[jedna] szklanka <i>herbaty</i>
<i>Fleisch</i>	<i>Tee</i>	(ein) Kilo(gramm) <i>Fleisch</i> [**]	(ein) Glas <i>Tee</i> [**]
<i>viando</i>	<i>teo</i>	(un) kilogramo/funto <i>da</i> viando [*]	(un) glaso <i>da</i> teo

[*] En E, do, estas uzataj malsamaj prepozicioj en *Un kilo da viando*, *Un glaso da teo*, ol en *La prezo de la viando*, *La koloro de la teo*.– Diference, por ĉiuj tiaj esprimoj, en F, A, H estas uzataj la samaj prepozicioj, kaj en G, R, P la samaj genitivaj formoj.

[]** En tiaj simplaj G esprimoj oni uzas nominativon, sen ia ligilo (*Un kilogramo viando*, *Un glaso teo*).– Sed oni eksplice uzas genitivon ĉe ekzisto de determinanto por la mezurita substantivo: *Ein Kilo dieses Fleisches* = *Un kilogramo de tiu ĉi viando*.– *Ein Glas dieses Tees* = *Un glaso de tiu ĉi teo*. (Vidu (5.8.7)).•

Rim.– [[Ni disponas du ilojn por interpreti la signifon de la du E ekzemploj en ĉi tabelo, nome: La UV-preskribo pri la signifo/rolo de *da*, kaj la jam de antaŭe ekzistantaj kaj bone konataj signifoj de la koncernaj nacilingvaj esprimoj]].•

.....

(2.2) Nenia problemo ĉe la una

ekzemplo de UV, ĉar laŭ ambaŭ interpretiloj diritaj en [i], jen ni venas al la senduba konkludo, ke en tio temas pri *preciza mezuro de kvanto da viando*.

• [Un] kilogramo *da* viando. (UV)

[[Laŭ la baza rolo de *da*]: La E prepozicio *da* estas uzata post vortoj esprimantaj mezuron, nombron, [[kvanton]]. (UV) **[*]**

[*] [[Ni konstato, ke la prepozicio *da* ludas tri parencajn, sed malsamajn rolojn.– Nu, ni tiujn nomos la *baza*, *larĝa* kaj *kompleksa* roloj de *da*]]. (Vidu (2.3), (2.4)).

-- Ĉi-apude temas pri pliaj ekzemploj pri *preciza mezuro de iaj kvantoj*, pere de mezur-unitoj multiplikataj per nombraj koeficientoj.

- Du funtoj *da* te-folioj.
- Tri duonlitroj *da* te-trinkaĵo.
- Un tuno *da* sablo.
- Dek jardoj *da* ŝnuro.

- 60 paĝoj *da* densa teksto.
- Tri kiloj *da* bombonoj. **[*]**
- Tri jaroj *da* suferoj / suferado.
- [[Tiu estis por mi jaroj *de* sufero]].

[*] Ĉiuj ekzemploj pri bombonoj en ĉi paĝoj baziĝas sur un ekzemplo el RV (vidu (8.1)).

-- [[Ĉi-apude temas pri samspecaj ekzemploj, tamen kadre de sencoplenaj propozicioj priskribantaj situaciojn en kiuj estas uzataj tiaj mezur-esprimoj sekvataj de *da*]].

- *Mi aĉetis tri funtojn da viando.*
- *Mi aĉetis un litron da lakto, kaj tuj eltrinkis tiun litron da lakto.*
- *Mi trinkis tutan litron da lakto.*
- *Mi trinkis preske tutan litron da lakto.*
- *Mi aĉetis kaj tuj manĝis tri funtojn da bombonoj.*
- *[[Mi manĝis 30 eŭrojn da bombonoj]]. (Ŝerce)*

-- Laŭ (2), *da* venas post vortoj kun signifo pri mezuro, nombro, kvanto. Nu, ni ĵus malvolvis ekzemplojn pri mezuro, kaj antaŭ ol pasi al la studo de la dua UV-ekzemplo, jen konvenas ke ni prezentu ekzemplojn kun rolo de nombroj kaj de kvantoj laŭ ĝenerala senco:

.....

(2.2.1) Jen ekzemploj pri precizaj mezuroj per puraj nombroj, en la speciala kazo en kiu la nombroj havas substantivan formon.

- *Mi havas [[un]] centon da pomoj. (EKZ)*
- *Mi laboris en tiu entrepreno dum du dekoj da jaroj.*
- *Tiu ĉi urbo havas [[un]] milionon da loĝantoj. (EKZ)*
- *Mi aĉetis [[un]] dekduon da kuleroj kaj du dekduojn da forkoj. (EKZ)*
- *Mil jaroj (aŭ milo da jaroj) faras [[un]] miljaron / (EKZ) [[un jarmilon]].*

-- Kaj jen samspecaj ekzemploj, sed en la ĝenerala kazo, en kiu la nombroj havas la bazan, nevarian adjektivan formon (ĉe kio *da* ne estas uzata).

- *Mi havas cent pomojn. (EKZ)*
- *Mi aĉetis tri pomojn kaj manĝis du el tiuj pomoj.*
- *Mi laboris en tiu entrepreno dum dudek jaroj.*

.....

(2.2.2) Kaj jen, fine, ekzemploj en kiuj la vorto antaŭ *da* havas signifon de *proksimuma aŭ ne tute preciza mezuro aŭ kvanto*:

- | | |
|--|---|
| <ul style="list-style-type: none"> • <i>Iom/ multe/ malmulto da teo.</i> • <i>Guto da veneno.</i> • <i>Multo da laborado.</i> • <i>Multaj jaroj da suferado.</i> • <i>Mi aĉetis kelke da bombonoj.</i> • <i>Mi laboris en tiu entrepreno dum kelke da jaroj/ dum kelkaj jaroj.</i> • <i>Mi manĝis iom da pano/ bombonoj.</i> • <i>Multe da birdoj. (EKZ)</i> | <ul style="list-style-type: none"> • <i>Pli da bruo, ol da fano. (PE)</i> • <i>Granda nombro da birdoj. (Z.)</i> • <i>Aroj da bellanaj ŝafoj. (EKZ).</i> • <i>Granda serio da pafilegoj. (EKZ)</i> • <i>Sur la bordo de la maro staris amaso da homoj. (EKZ)</i> • <i>Mi dronas en maro da duboj. [Metafore]</i> • <i>La firmaon ruinigis lavango da problemoj. [Metafore]</i> |
| <ul style="list-style-type: none"> • <i>En la ĉambro sidis nur kelke da homoj. (EKZ).– (Aro da homoj, ĉiuj kune).</i> • <i>Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj. (EKZ).– (Diversaj, apartaj homoj)</i> | |

Rim.– Jen resumaj ekzemploj pri la tri malsamaj mezur-tipoj kadre de la baza rolo de *da*.
(T.e.: Preciza mezuro pere de mezur-unitoj, preciza mezuro pere de nombroj, nepreciza mezuro).

- *Mi aĉetis tri funtojn da viando*
- *Mi havas un centon da pomoj*
Mi havas cent pomojn.
- *Mi manĝis iom da pano.*

(2.3) [[Tre diference al la simpla kaj klara una UV-ekzemplo, jen la dua ekzemplo, (*Un*) *glaso da teo*, principe ŝajnas stranga, ĉar ĝi ne laŭas la UV-eksplikojn pri *da*, ĉar "glaso" –almena, unavide– ne estas *mezuro*, *nombro*, *kvanto*, sed ia *ujo*]].

-- Nu, ni une studu pri la signifo de la koncernaj nacilingvaj esprimoj en UV. [[Tian studon mi povas firme fari nur en rilato al H, kaj pli-malpli firme nur pri F kaj A]].

-- La nacilingvaj vortaroj H *Diccionario de la Academia*, F *Dictionnaire Larousse*, A *Oxford Dictionary* prezentas jenajn du bazajn signifojn por "glaso" (*vaso*, *verre*, *glass*):

[1] *Recipiente...*, *Réceptient...*, *A container...* (t.e., "Ujo..." – ja la sola signifo en PIV kaj RV).

[2] *Cantidad de líquido que cabe en un vaso.- Le contenu d'un verre.- The contents of a glass* (t.e., *Kvanto da likvo entenebla en glasoj*, *La enhavo de glasoj*, *La enhavo de glasoj*).

-- Evidente, la signifo propra de "glasoj" ja estas [1], sed la lingvoj suverene decidas pri la konvencio ke, kadre de adekvata kunteksto, jen "glasoj" havu la signifon [2].

-- 🍷 [[Nu, se ni (almena provizore) supozas, ke tia sama konvencio ekzistas anke en E, jen ni venas al ĉi-sekva interpreto de la dua UV-ekzemplo, kaj, sekve, anke al ĉi-sekva *modif(et)o* de la UV-preskribo pri *da*]]:

<ul style="list-style-type: none"> • <i>Un kilogramo da viando</i>. (UV) • <i>Un litro da lakto</i>. • <i>Mi aĉetis dekon da ovojn</i>. [EKZ]. • <i>Multe da birdoj</i>. [EKZ] 	<ul style="list-style-type: none"> • <i>Un glasoj da teo</i> (UV) = [[<i>Un glaspleno da teo</i>]] = [[<i>La kvanto da teo entenata en un glasoj plena je teo</i>]]. • <i>Un skatolo da bombonoj</i> = [[<i>Un skatolpleno da bombonoj</i>]] = [[<i>La kvanto da bombonoj entenata en un skatolo plena je bombonoj</i>]].
<p>[[Laŭ la larĝa rolo de <i>da</i> (kiu inkludas ĝian bazan rolon)]]: <i>La E prepozicio da estas uzata post vortoj esprimantaj mezuron, nombron, [[kvanton]]</i>, [[<i>kiel anke post vortoj kiuj estas nomoj de ujoj al kiuj ni konvencie atribuas signifon de mezuro</i>]].</p>	

-- Rimarkindas, ke se la laŭnorma parolo en E estus *Un glaspleno da teo*, *Un skatolpleno da bombonoj*, eĉ problemoj ne ekzistus, ĉar jen rekte temas pri mezuro, do sen bezono enkonduki la diritan modifon en la UV-preskribo pri *da*. (Tamen, kvankam temas pri esprimoj logike ĝustaj, jen *glaspleno* kaj *skatolpleno* ne estas vortoj lingvistile akcepteblaj en ĉiu kazo).

-- Eĉ plie: Se la laŭnormaj esprimoj estus *glaspleno* kaj *skatolpleno*, jen ni povus tre pli simple klarigi la problemon dirante ke, ĉe kunteksto adekvate klara, jen ni konvencie kurtigas tiujn laŭnormajn esprimojn al *glasoj* kaj al *skatoloj*.

-- Kia ajn estu la klarigo pri la problemoj kiun oni preferas, jen ni (almena provizore) [[akceptas]], ke estas ĝusta la farita interpreto pri la dua UV-ekzemplo, ĉar ĝi paŭzas la diritajn

H, F kaj A formojn, ĉar ĝi finfine montriĝas kohera kun la baza rolo de *da*, kaj ĉar ĝi estas konfirmita de alifontaj sencoplenaj ekzemploj zamenhofaj.

- *Mi eltrinkis tutan botelon da vino* (DL).
- *Trinki glason da teo* (Z.)

.....

(2.3.1) Jen ankore kelkaj pliaj rimarkoj pri la nun traktata temo:

- La una frazo ĉi-apuda estas do kurta maniero diri "Mi trinkis glasplenen *da* vino".

Tamen, ja nenio malhelpas ke, por reliefigo aŭ alikaŭze, oni pleonasme diru "Mi trinkis plenan glason *da* vino = Mi trinkis plenan glasplenen *da* vino".

- *Mi trinkis glason da vino.*
- *Mi trinkis tutan/ plenan/ plenplenan glason da vino.*
- *Mi trinkis duonplenan/ neplenan/ preske plenan glason da vino.*
- *Plena glaso da vino, sed kun guto da veneno. (PE).*
- *Mi manĝis tutan skatolon da bombonoj.*

- La esprimo "Mi trinkis plenplenan glason *da* vino" reliefigas la fakton, ke la glaso estis ĝisrande plena, en kontrasto kun la ordinara signifo de "Glaso *da* vino", temanta pri glaso ne tute plena por oportuna trinkado.

- La esprimoj "Mi trinkis neplenan glason *da* vino" k.s. estas perfekte klaraj kaj validaj laŭ lingva vidpunkto, eĉ se per tio ni venas al la logike iom grinca "Mi trinkis neplenan glasplenen *da* vino".

- Analoge al *glaspleno* oni povas formi multajn vortojn por indiki proksimumajn, pli-malpli klare difinitajn kvantojn kaj mezurojn.

- *plenglaso/glaspleno.*
- *plenskatolo/skatolpleno.*
- *plenkulero/ kulerpleno/ cucharada/ cuillerée/ spoonful*
- *plenĉaro/ ĉarpleno, ktp.*

(2.3.2) En la du unaj ĉeloj de (2) ni havas jenajn du redakto-alternativojn pri la signifo/rolo de *da*:

- *La E prepozicio da estas uzata post vortoj esprimantaj mezuron, nombron, [[kvanton]]. ([[Mia traduko]] el UV).*

- *Da post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro. (EKZ.32)*

-- Pri la una alternativo ni ĵus malvolvis.

-- [[Nu, unavide, ĉi du preskriboj ŝajnas sinonimaj (tiel ke la dua el ili estus nura superflua ripeto de la una –ja tiu pli baza el la du), sed ni povas konsideri (eĉ se eble per iom da harfendado) ke ili fakte prezentas du inversajn alirojn al la temo, jene]]:

- Laŭ UV: Donitaĵo: Ni supozas, ke ni havas vorton kun strikta signifo pri mezuro k.s ("funto", "cento", "iom").– Sekve: Post ĝi oni uzu *da*.

Temas, do, pri la baza rolo de *da*, laŭ (2.2) kaj (2.3).

- Laŭ EKZ.32: Donitaĵo: Ni supozas, ke estas uzata la prepozicio *da*.– Sekve: La antaŭa vorto havas signifon de mezuro (kio ja inkludas la vortojn "funto", "cento", "iom", k.s., sed kiu anke allasas vortojn "glaso", "skatolo" se ni al tiuj konvencie atribuas signifon de mezuro.).

Temas, do, pri la larĝa rolo de *da*, laŭ (2.4).

- 🍷 Jen ni definitive akceptas valida la larĝan rolon de *da*.

(2.4) Ni venas nun al la preskribo laŭ la tria ĉelo de (2):

RV prave atentigas (vidu (8.1)), ke la EKZ-preskribo laŭ la una ĉi-apuda linio

• *Glaso da vino estas glaso plena je vino* (EKZ.32) = *Glaso kune kun la vino kiun ĝi enhavas kiam ĝi estas plena je vino* = [[*Glaso + glaspleno da vino*]].

[[logike]] havas la [[kompleksan]] signifon laŭ la dua kaj tria linioj.

-- 🍷 [[Nu, jen ni venas al kontraŭdiro laŭ vidpunkto de strikta logiko, ĉar laŭ (2.3), la esprimo *Glaso da vino* signifas *Glaspleno da vino*, sed nun ĝi signifas *Glaso + glaspleno da vino*]].

-- [[Tamen, laŭ lingva vidpunkto ni en tio ne havas kontraŭdiron, sed nur plian komplikaĵon en la rolo/signifo de *da*, ĉar frazoj jam traktitaj kun un sola signifo, nun iĝas dusignifaj, kiel en jenaj ekzemploj]]:

• <i>Funto da viando/ Deko da pomoj/ lom da lakto</i>	-----
• <i>Glaso da vino = Glaspleno da vino.</i> • <i>Skatolo da bombonoj = Skatolpleno da bombonoj.</i>	• <i>Glaso da vino = Glaso + glaspleno da vino.</i> • <i>Skatolo da bombonoj = Skatolo + skatolpleno da bombonoj.</i>
[[Laŭ la larĝa rolo de <i>da</i>]]	[[Laŭ la kompleksa rolo de <i>da</i>]]

(2.4.1) [[Problemo nun ŝprucas, do, 'kiel distingi tiujn du signifojn en la parolo: Nu, tion oni atingas per la ĝenerala tiucela lingva rimedo, nome, per uzado de kunteksto adekvata al ĉiu el la diversaj signifoj, ĉi-kaze kiel en jenaj ekzemploj]]:

(Nur la enhavo de la ujo)	(La ujo + ĝia enhavo)
<ul style="list-style-type: none"> • <i>Mi trinkis tri glasojn da vino.</i> • <i>Mi manĝis un skatolon da bombonoj.</i> • <i>Tiu recepto inkludas kuler(plen)on da salo.</i> • <i>Mi eltrinkis la restaĵon de lia botelo da vino.</i> <p>• ... <i>kiu sidis kun la alumetoj, el kiuj preske un tuta skatoleteto estis forbruligita.</i> (Z.) [[*skatoletpleno*]] (Vidu (5.8.14))</p>	<ul style="list-style-type: none"> • <i>Mi mendis tri glasojn da vino en la kafejo.</i> • <i>Mi aĉetis un skatolon da bombonoj.</i> • <i>Mi aĉetis tri botelojn da vino.</i> (Int) • <i>Mi vendas amasojn da kestoj da boteloj da vino.</i> • <i>La vojkamarado pretigis grandan vazon da punĉo.</i> (Z.) • <i>Ŝi ne vendis ankore eĉ un skatoleton da alumetoj.</i> (Z.)
<ul style="list-style-type: none"> • <i>Mi aĉetis kaj tuj elmanĝis tri skatolojn da bombonoj.</i> • <i>La kelnero pretigis por mi tri tasojn da kafo, kaj mi tuj eltrinkis kaj pagis tiujn tasojn da kafo.</i> • <i>Mi kaŝis la ringon en botelon da vino, kaj la diamantojn en skatolon de bombonoj (= en bombonskatolon).</i> 	

• *En tiu uzino oni fabrikas botelojn el vitro/ vitrobotelojn/ vitrajn botelojn.- Temas pri boteloj de/ por vino; vinboteloj.- Tiujn botelojn oni plenigas per vino en vinfarejo, tiel ke oni ricevas botelojn da vino, kaj tiuj estas poste vendataj pogrando al butikoj, en kestoj da boteloj da vino.- La klientoj aĉetas botelojn da vino en la butiko, trinkas tiujn botelojn da vino, kaj la (malplenajn) (vin)botelojn jetas en la rubujon.*

Do, *Botelon da vino, Skatolon da bombonoj* laŭ la signifo "Nur la enhavo" oni ĝenerale konsumas, trinkas, verŝas, uzas en kuirado, uzas por sinlavado, manĝas, ktp.

Kaj *Botelon da vino, Skatolon da bombonoj* laŭ la signifo "Ujo + enhavo" oni ĝenerale fabrikas, aĉetas, vendas, mendas, donacas, gardas en kelo, metas sur tablon, ktp.

(Kaj, en okazo de bezono, oni faras la informon adekvate klara per aldono de pli detala kunteksto).

Ekzemplo.— La una parto de ĉi-apuda ekzemplo havas klaran signifon, nome: La komercado okazis per ŝtofoj kaj tukoj.— Pri la dua parto, se harfendi, ne estas decide klare, 'ĉu

• *Ili komercis kun vi per belegaj ŝtofoj, purpuraj kaj broditaj tukoj, kestoj da multekostaj ŝtofoj, ĉirkaŭligitaj per ŝnuroj kaj cedrokovritaj.* (Bib)

temas pri "kestoj da ŝtofoj = kestoplenoj da ŝtofoj" (laŭ la larĝa rolo de *da*, tiel ke daŭre temas pri komercado per ŝtofoj), kaj/aŭ pri "kestoj da ŝtofoj = kestoj + kestoplenoj da ŝtofoj" (laŭ la kompleksa rolo de *da*, tiel ke en la komercado estus vendataj la cedrokovritaj kestoj kune kun sia enhavo, do kvaze oni vendus kestojn da boteloj da vino).

Laŭ RV (en la artikolo pri *da*), [[nepre]] temas pri la dua signifo (kestoj+kestoplenoj).

(Do, ĉe bezono pri preciza parolo, jen oni precize parolu per almeto aŭ aldono de adekvata kunteksto).

Rim.— [i] Kiel jam traktite en (2.3), jen anstat la frazon *Mi manĝis skatolon da bombonoj* oni povas diri *Mi manĝis skatolplenen da bombonoj* (logike pli ĝuste, sed neakceptebla por la ordinara parolo).

Kaj ja estus netolereble anstatigi *Mi aĉetis skatolon da bombonoj* per *Mi aĉetis skatolon kun skatolpleno da bombonoj*. (Nur en iuj kazoj oni povus diri *Mi aĉetis skatolon plenan je/de/per bombonoj*).•

[ii] Kadre de adekvata kunteksto aŭ situacio, oni ofte uzas stumpajn frazojn kiel en ĉi ekzemploj (kun subkompreno, laŭ la kazoj, pri la trinkaĵo, pri la ujo, ktp).•

- *Mi trinkis du glasojn.*
- *Mi trinkis du vinojn.*
- *Mi manĝis du telerojn.*
- *Mi fumis un picon.*

[iii] RV atentigas pri konstruoj kiel *Botelo kun vino, Skatolo kun bombonoj*.— Vidu (8.1).•

[iv] RV atentigas (en (8.2)) pri ne-traktado en PAG/PIV pri tio, kiun ni tie ĉi nomas "la tri roloj de *da*".•

☛ [iv] [[En PAG/PIV kaj RV estas donita multo da ekzemploj kun *da*: Nu, en la granda plimulto el ili temas pri la baza rolo de *da*, do kun nur kelkaj ekzemploj pri ties larĝa aŭ kompleksa roloj]]. [[Supozeble, tio ŝuldiĝas al la fakto, ke tiaj konstruoj estas maloftaj en la fontoverkoj]].•

.....

(2.4.2) Por kompleteco, ni revenu al traktado de ĉi aferoj en H, F, A:

-- En (2.3) temis pri la du signifoj de la vorto "glaso" registritaj en la vortaroj, nome: [1], la ujo;

[2], la enhavo de la ujo.

Nu, anke almene en tiuj lingvoj, la vorto "glaso" havas anke la kompleksan signifon "glaso+glaspleno", kvankam la gramatikoj kaj vortaroj tion ne registras [[kion, do, oni povus konsideri manketo laŭ vidpunkto de gramatiko]].

Tia kompleksa signifo ja tamen estas ĉiupaŝe uzata egale kiel la simpla signifo "glaspleno", kaj ambaj signifoj estas distingataj pere de la samaj rimedoj kiel en E, t.e., pere de "aĉeti" kontraste al "trinki" ktp.

-- Nu, se tiuj vortaroj decidus registri anke la kompleksan signifon, jen ili aldonus trian alineon, pli-malpli jene:

[3] [[*El recipiente y su contenido pleno.– Le récipient et son plein contenu.– The container and its full contents* (= la ujo kaj ĝia plena enhavo)]].

[[Per tio oni venus al pli preciza gramatika traktado, tamen sen gajno, perdo aŭ modifo en la ĝusteco de la parolo, kiu daŭre uzus la saman frazon por ambaj signifoj, kaj por distingado ĝi daŭre sin helpus per la diritaj kontrastaj rimedoj "aĉeti", "trinki", ktp]].•

-- Jena tabelo resume prezentas la aferojn ĵus traktitajn, kune kun la respondaj H, F, A esprimoj:

		Enhavo Ujo + enhavo [*]
<ul style="list-style-type: none"> • Glaso <i>de/por</i> vino, vinglaso • Vaso <i>de/para</i> vino • Verre <i>à</i> vin • Wine glass • Skatolo <i>de/por</i> bombonoj, bombonskatolo 	<ul style="list-style-type: none"> • Litro <i>da</i> vino • Litro <i>de</i> vino • Litre <i>de</i> vin • Litre <i>of</i> wine • Kilo <i>da</i> bombonoj 	<ul style="list-style-type: none"> • Glaso <i>da</i> vino • Vaso <i>de</i> vino • Verre <i>de</i> vin • Glass <i>of</i> wine • Skatolo <i>da</i> bombonoj

[*] Distingado inter ambaj signifoj pere de la kontrastoj *fabriki / konsumi, aĉeti / manĝi*, ktp.

Rim.– [i] Rimarkindas, ke H ĉiukaze uzas la prepozicion *de*.•

[ii] 🍷 [[En praktiko, esprimojn kiel *Glaso da vino* mi ĉiam komprenis kaj manipulis, sen plia penso pri la afero, paŭsante la supre diritan H aranĝon laŭ la signifoj [1] kaj [2] plus per helpo de kunteksto por distingado inter la signifoj [2] kaj [3] (do, gramatike iom fuŝe, sed parole ĉiam ĝuste)].

[[Tial, nur ĉe tajpado ĉi paĝojn mi unafafoje venis al eksplike distingaj vortigoj "*glaspleno da akvo*" kontraste al "*glaso + glaspleno da akvo*"]].•

(2.5) Pliaj ekzemploj kun *da*, elektitaj el EKZ:

- *Mi havas cent pomojn.– Mi havas [un] centon da pomoj.–... du dekduojn da forkoj.*
- *Sur la bordo de la maro staris amaso/ aro/ [grupo] da homoj.*
- *Alportu al mi [un] metron da nigra drapo. (Metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo).*
- *Ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj.*
- *Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo.*
- [[*Mi revenos post kvarono da horo*]]. (DL) [*]
- *Multe / multo / multego / kelke / [iom] da diamantoj / mono / pakaĵo.*

- En la daŭro *de* kelke *da* minutoj mi aŭdis du pafojn.
- Kvar metroj *da* tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; tial du metroj kostas kvar kaj duonon frankojn (aŭ [kvar kaj duonon] *da* franko). **[**]**
- [[Kvar metroj *da* ŝtofo kostas naŭ frankojn]].

[*] [[Ĉi frazo aperas anke en (1.1)]. [[Kadre de PAG/PIV, la ĝusta formo estas *Mi revenos post kvarono de* horo]].

[]** [[Kadre de PAG/PIV, la ĝusta formo estas *Kvar metroj de tiu ĉi ŝtofo*]].

-- Laŭ PAG: Pli bone, *kvar frankojn kaj duonon*; prefere *kvar kaj duonan frankojn*.—
[[Pli longe: *kvar frankojn kaj duonon de* franko]]. (Vidu (5.8.8)).

(2.6) Kelkaj redakto-alternativoj.

- Tri metroj *da* longo = Longo *de* tri metroj.
- Tri metroj *da* ŝtofo = Peco *da* ŝtofo kun longo *de* tri metroj.

- Maŝinoj, pumpantaj la akvon en la kvanto *de* 135 mil litroj en minuto. (Z.)
- [[Maŝinoj, pumpantaj (la) akvon po 135 mil litroj en minuto]].
- [[Maŝinoj, pumpantaj po 135 mil litrojn *da* akvo en minuto]].

La ĉefaj diferencoj en la tria alternativo rilate la du aliajn estas, ke en ĝi la akuzativo troviĝas en *litrojn* (ne plu en *akvon*), kaj ke nur en ĝi uzatas la prepozicio *da*.

- Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn *da* longo. (EKZ) [[malpli ofte: *laŭ* longo]]
- [[Tiu ĉi rivero havas longon *de* ducent kilometroj]]
- [[Tiu ĉi rivero estas ducent kilometrojn longa]]. [[pliaj alternativoj eblas]]

- [[*Mi manĝis duonfunton da* pano = (logike) *Mi manĝis panon en la kvanto de* duonfunto]].

(3) Kelkaj ekzemploj pri variado en la uzado de la kontrasto *de/da*.

-- Kadre de ĝenerala sistema traktado de tiu kontrasto, jen tamen ĉiu aŭtoro pli-malpli ofte prezentas [[sendanĝerajn]] deviojn de tia sistemeco.

(3.1) En la una kolono de ĉi tabelo aperas kvar aŭ kvin grupoj da zamenhofaj frazoj: Ĉiuj frazoj en ĉiu grupo estas sintakse samstrukturaj kaj semantike tute parencaj, kaj tamen ili montras nekoheran uzon de la prepozicioj *de* kaj *da*.

-- En la dua kaj tria kolonoj anticipe aperas la respektivaj alternativoj uzendaj laŭ la reguloj de PAG/PIV kaj de RV. (Vidu (5.8) kaj (8)):

	PAG/PIV	RV
(1a) <i>Un tago estas 365ono aŭ 366ono de</i> jaro. (EKZ)	<i>de</i> ĉiukaze	<i>da</i> ĉiukaze
(1b) <i>Pezo de</i> duono <i>de</i> siklo. (Bib)		
(1c) <i>Mi revenos post kvarono da</i> horo. (DL)		
(1d) <i>Bela vizaĝo estas duono da</i> doto. (PE)		

(2a) <i>La plej granda parto de la novaj vortoj.</i> (ApF) (2b) <i>Duonon de tiu ĉi piro mi manĝis.</i> (DL) (2c) <i>Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo.</i> (EKZ)	<i>de</i> ĉiukaze	<i>da</i> ĉiukaze
(3a) <i>Pli granda nombro de verkantoj.</i> (AID) (3b) <i>Granda nombro da ĉambroj.</i> (DL) (3c) <i>Certa nombro de miaj Respondoj.</i> (ApR) (3d) <i>Multe da miaj verkoj.</i> (Rev)	<i>da</i> <i>da</i> <i>de</i> <i>de</i>	<i>da</i> ĉiukaze
(4a) <i>Fontoj de enspezoj.</i> (Z.) [[= <i>enspezo(j)-fontoj</i>]] (4b) <i>Fonto da akvo.</i> (Bib) [[(Se kun <i>de</i>) = <i>akvo-fonto</i>]]	<i>de</i> ĉiukaze	<i>de</i> ĉiukaze
(5a) <i>Centoj da miloj de vortoj.</i> (Bo) [*] (5b) <i>Miloj kaj dekmiloj da tiaj "neeblaj" libroj.</i> (ApD)	<i>da</i> ĉiukaze	<i>da</i> ĉiukaze

[*] Ekzemplo preske certe ne-zamenhafa: Ĝi aperas en la traduko far Gernet (kvankam laŭkonjekte reviziita de Z.) de ruslingva letero de Z.

Rim.– Oni povus deziri kronologian analizon de la ĵusaj frazoj en rilato al eventuala evoluo de Z. ĉe uzado de ĉi prepozicioj.– Sed tio ja ne estas la celo de ĉi ĉerpajo (kaj eĉ ne povus esti, pro mia manko de kompetento pri tia tasko).•

.....

(3.1.1) Jen du pliaj ekzemploj (ĉerpitaj el RV), la una kun ĝusta uzo de *de/da*, kaj la dua kun erara uzo:

• <i>Torento da larmoj kaj flamoj de honto.</i> (Z.)
• <i>Mankis preskaŭ 2 milionoj da kilovattoj de elektro en Tokio.</i> (Int) [[2 milionoj da kilovat-horoj da elektro / da elektra energio]]

.....

(3.2) [[Diferencetoj ĉ malgravaj?]]:

Laŭ PIV: <i>komitato: Grupo de personoj, elektita en ...</i> [[Anke: <i>Grupo el personoj, ...</i>]] [[Temas pri grupo: Grupo elektita, grupo konsistanta el personoj]].	Laŭ RV: <i>komitato: Grupo da personoj, elektitaj por ...</i> . [[Temas pri personoj: Personoj elektitaj, personoj konsistigantaj grupon]].
--	--

Rim.– [i] Vidu "Formulo de Stojan", en (6).

[ii] [[Certe laŭ jura vidpunkto (kaj, laŭ mia kompreno, anke laŭ vidpunkto de logiko kaj de la realaj faktoj), terminoj kiel *komitato*, *parlamento*, *senato*, *kolegio*, *armeo*, *partio*, *skipo*, *teamo* ktp havas ĝuste la karakterizan trajton, ke ĉiu el ili estas *grupo* kiu unbloke decidas kaj agas en ĉiu unopa okazo (do, laŭ la difino de PIV, kaj ne laŭ tiu de RV)].•

.....

(3.3) Ekzemploj laŭ personaj preferoj kaj/aŭ laŭ diversaj nuancoj:

- *Aroj da bellanaj ŝafoj.* (EKZ).
- *La popolaĉo estas kvaze aro de bovoj.* (Fa).
- *Aro el eminentaj personoj* (en PIV kaj RV, kun rekomendo pri "*da*" anstat "*el*").
- [[*Aro el ŝafoj.*– *Aro da ŝafoj* = *ŝafaro*]].
- *Kaj granda aro el la pastroj obeis al la fido* (BibN).– (Interesa ekzemplo, en kiu *granda aro el la pastroj* signifas *granda parto de la pastraro*. ("And a large number of priests became obedient to the faith").

.....

(3.4) Erara uzo:

- *Komitato da tri membroj* (Int, en malnova revuo). [[*Komitato de/el tri membroj*]]

(4) La tre kompleksa kaj [[kvaze kaŝita]] LR.16.

Rim.– [i] Ĉi LR estas el la jaro 1907; la una eldono de "Plena Gramatiko de Esperanto" estas el la jaro 1935. •

[ii] Mi almetis la epiteton "kvaze kaŝita" pro jenaj du silentoj pri ĝi (por mi surprizaj kaj nekomprenataj):

- Kiel ni konstatos en (5.8), jen PAG/PIV [[fakte enhavas kaj ĝeneraligas]] ĉi LR, kaj tamen ĝin ne citas, kaj prezentas neniun el ties kernaj ekzemplaj frazoj.
- Kiel ni konstatos en (8.8) kaj (8.9), jen RV [[ne akceptas]] ĉi LR, kaj de ĝi ĝi nur preterpase kaj kripale citas du erojn. •

(4.1) Jen ni une prezentas la tutan LR.16 numerante ties sinsekvajn partojn. Kaj en (4.2) ni ĝin komentos:

[1] La esprimo "dum la frua parto da la jaro" ŝajnas al mi nebona;...

[2] mi preferas "dum la frua parto de la jaro"...

[3] ĉar en la dirita frazo la vorto "parto" signifas ne mezuron, sed nur limigitan apartaĵon.

[4] Tiel ekzemple "monato" estas parto da tempo, ĉar ĝi esprimas simple mezuron [[prefere, kvanto da tempo]]...

[5] sed "Januaro" estas parto de jaro, ĉar ĝi esprimas ne mezuron, sed difinitan limigitan apartaĵon.

[6] "kvaronjaro" (= mezuro [[?]]) estas parto da jaro, ... [[laŭ PAG/PIV, prefere, parto de jaro]]

[7] sed "printempo" (= speciale montrita parto) estas parto de jaro.

[8] Oni devas memori, ke "parto", "peco" ktp havas la sencon de mezuro ofte, sed ne ĉiam.

[9] Dum la vorto "da" (kiu enhavas kaŝite la sencon de [[la nedifina adjektivo]] "ia") ...

[10] montras, ke ni parolas pri kvanto da ia aĵo, sed ne pri ĝia individueco...

[11] (ekzemple "peco da viando = peco da ia viando"), ...

[12] la [[difina]] artikolo "la" montras, ke ni parolas pri objekto individue difinita (aŭ pri ĉiuj objektoj de la sama speco), de kiu ni prenas parton...

[13] ekzemple "peco de la viando kiun mi havas antaŭ mi".

[14] Tial ni povas diri, ke, kvankam teorie la kombinado de "da" kun "la" ne estas malpermesata...

[15] sed en la praktiko tia kombinado estas uzebla nur en tre maloftaj okazoj, ...

[16] tiel malofte, ke ni eĉ povas simple konsili, ke oni neniam uzu "da" antaŭ "la"...

[17] (krom la okazoj, en kiuj la senco tion ĉi nepre kaj tute sendube postulas).

(4.2) Kaj jen la komentoj pri LR.16:

(4.2.1) Pri la prepozicioj *de* kaj *da* laŭ UV (vidu en (1) kaj (2)):

- La prepozicio *de* estas plursignifa, esprimanta nuancojn pri posedo, aparteno, origino, aganto, ktp.
- La E prepozicio *da* estas uzata post vortoj esprimantaj mezuron, nombron, [[kvanton]].

.....

(4.2.2)– En rilato al [8, 3, 5, 7] de LR.16: Oni diras *parto de*, *peco de*, se la vortoj *parto*, *peco* havas signifon de (*difinita*) *limigita apartaĵo* aŭ de *speciale montrita parto*.

Oni diras *parto da*, *peco da*, se la vortoj *parto*, *peco* havas signifon de *mezuro*.

.....

(4.2.3)– En rilato al [5, 7]: *Januaro* estas *parto de* jaro, ĉar ĝi esprimas ne mezuron, sed difinitan limigitan apartaĵon [[*de* jaro]].

Anke *printempo* estas *parto de* jaro, ĉar ĝi estas speciale montrita parto [[*de* jaro]].

Rim.– [[Fakte, tie ĉi temas pri ludo per preskaj sinonimoj *parto de* / *apartaĵo (dis)de* aŭ per taŭtologio *parto de* / *parto de*]].•

.....

(4.2.4)– En rilato al [4]: *Sekundo*, *minuto*, *horo*, *tago*, *semajno*, *monato*, *kvaronjaro*, *jaro*, *jarcento*, *jarmilo* estas partoj/[[kvantoj]] *da* tempo de kreskantaj ampleksoj]]. [[Ofte oni simple diras *tempo-kvantoj*, vidu (6.2)].

[[Kvankam ĉiuj niaj fontoj uzas la esprimon "*parto da* tempo", jen laŭ la preciza terminologio de Fiziko oni devas diri "*kvanto da* tempo" (ja ambakaze kun la prepozicio *da*)].

Rim.– Ĉi LR diras, ke *monato* esprimas simple mezuron: Nu, per pli preciza parolo, jen ni havas, ke *monato*, *jaro*, ktp propre ne estas mezuroj, sed difinitaj partoj/kvantoj *da* tempo uzataj estiel unitoj por mezurado aliajn kvantojn *da* tempo (kiel en *Dum miaj dudek jaroj da laborado en la kampo*, aŭ *Mi aĝas je 25 jaroj plus 3 monatoj plus 18 tagoj*]].

[[Anstat *unitoj por mezurado de kvantoj da tempo* oni ofte simple diras *temp-unitoj*]].•

.....

(4.2.5)– En rilato al [6]: *Kvaronjaro* (= mezuro [[?]]) estas parto *da* [[*de*]] jaro.

PAG/PIV preferas *parto de jaro* (vidu (5.8.9)).– RV ja uzas *da* (vidu (8.9)[b]).

[[Malgraŭ la klarigo "(= mezuro)" aperanta en la LR, jen en la frazo *Kvaronjaro estas parto da*[[*de*]] *jaro*, la vorto *kvaronjaro* ne estas mezuro de io ajn, ĉar la frazo simple diras, ke la temp-unito *kvaronjaro* estas un el la partoj en kiujn oni povas dividi la temp-uniton *jaro*]].

[[Ĉar en tiu frazo ne temas pri mezuro, jen en ĝi oni ne uzu la prepozicion *da*, sed *de*.– (Ĝi havas signifon de mezuro, ekzemple, en *Un kvaronjaro da laborado en la kampo*, aŭ en *Mi laboris en la kampo dum un kvaronjaro*)].

☛ [[Jen, do, *kaj malgraŭ tion diritan en ĉi LR*, oni devas diri *Kvaronjaro estas parto de jaro*, kun la ĝenerala prepozicio *de*, nun kun signifo de aparteno, *Kvaronjaro estas parto apartenanta al jaro*]]. [[Rimarku ke ni ree ludas per preskaj sinonimoj, *parto* / *apartenanta*]].

[[Analoge, oni ne diru *Monato*, *minuto*, *ktp estas partoj da jaro*, sed *Monato*, *minuto*, *ktp estas partoj de jaro*]].

Rim.– Se ni atentu la mezur-unitojn de kreskantaj ampleksoj cititajn en (4.2.4), jen ni povas munti ĉenojn kiel la jenaj, kun la prepozicio prepozicio *de* en ĉiu ĉenero:

Sekundo estas parto / frakcio / ono de minuto, de horo, de tago, de semajno, ...
Tago estas parto / frakcio / ono de semajno, de monato, de kvaronjaro, de jaro, ...
Kvaronjaro estas parto / frakcio / ono de jaro, de jarcento, ...

.....
(4.2.6).– Ni resumu pri la ĵusaj sekcioj:

- *Monato, tago, kvaronjaro, ...* estas partoj/[kvantoj] **da** tempo.- Anke: Ili estas temp-unitoj.
- *Januaro, printempo, kvaronjaro, monato, tago, ...* estas partoj **de** jaro.
- *Kvaronjaro, monato, tago, ...* ja enhavas nuancon pri kvanto, sed en la esprimoj [Un] *tago estas parto de la jaro* jen la vorto *tago* ne havas funkcion/signifon/rolon de mezuro, sed nur de parto apartenanta al jaro.
- En tiuj diversaj partoj de jaro rolas tamen diversaj nuancoj: Por ekzemplo, *printempo* propre ne estas parto de la temp-unito *jaro*, sed estas un la dividoj rilataj al la veter-ŝanĝoj tra la jaro.

.....
(4.2.7).– En rilato al [9, 10, 11]:

Rim.– Por redakti ĉi sekcion mi min gvidis per (5.8.2) (kiu siavice venas el PAG.133.H).– Tute speciale, el tio mi prenis la tre klaran kaj precizan esprimon "kondiĉoj pri la uzado de **da**".•

(a) Ni jam studis la normon, ke uzadon de la prepozicio **da** regas jena [[una]] kondiĉo: La substantiva sintagmo **antaŭ da** devas havi signifon de *mezuro, nombro, kvanto*. (UV, vidu (2)).

(b) Nu, jen LR.16 al tio aldonas gravan precizigon

(fakte, duan normon, pri kiu nenio estis antaŭe dirita en FE aŭ DL), ke doniĝas la egalaĵo montrata en la una ĉi-apuda ĉelo.

(c) Kaj ĉar **ia** estas nedifina adjektivo, jen la dirita egalaĵo kuntrenas [[la duan kaj lastan]] kondiĉon

<p>☛ da = da ia [nedifina ia]</p>
<p>Peco da viando = Peco da ia viando ("Peco" havas signifon de <i>kvanto</i>, kaj "viando" estas <i>nedifinita</i> [[<i>tuto</i> de kiu oni prenas tiun kvanton]]) (Vidu (5.8) kaj (5.8.2)).</p>

regantan la uzadon de **da**, nome: La substantiva sintagmo **post da** devas havi signifon de *nedifinita tuto*.

-- En la dua ĉelo montratas la tuta ekzempla frazo de LR.16, kune kun la analiz-skemo laŭ kiu ni studos ĉiun analogan frazon.

.....
(4.2.8) [[Kvankam pri tia afero nenion eksplice diras PAG.113.H, jen klaras, ke ĝiaj eroj orde laŭas la sekvojn de analizo pri la kohereco aŭ nekohereco kun ĉi tiu nova normo de la du frazoj kun **da** jam aperintaj en ĉi LR, kiel anke kun la **da**-frazoj en EKZ]].

-- Nun, jen la analizo pri tiuj du unaj frazoj:

(a) *Monato estas parto/[kvanto] da tempo* = ĉ *Monato estas parto/[kvanto] da ia tempo*?

Nu, tiu **ia** propre ne bone sidas, ĉar ekzistas nur un speco de tempo. Sed *tempo* ja estas nedifinita tuto, kaj tial la uzo de **da** estas kohera kun la dirita egalaĵo.

(b) *Kvaronjaro estas parto da jaro*. = ĉ *Kvaronjaro estas parto da ia jaro*?

Nu, tiu **ia** estas tie ĉi eĉ sensenca, ĉar temu pri parto **da/de** kiu ajn jaro.

Tial, tiu *parto da jaro* estas nekohera kun la dirita egalaĵo: Sekve, se la egalaĵo estu valida, jen oni devas diri "parto **de** jaro" anstat "parto **da** jaro" [[kaj tia estas la sinteno de PAG/PIV –kaj

tiu de mi lernita kaj akceptita]].– Sed se tiu *da* estas ĝuste uzata, jen la egalaĵo ne estas valida [[kaj, ŝajne, tia estas la sinteno de RV, vidu (8.6.3) kaj (8.9)].

.....

(4.2.9) Ni nin samcele turnu nun al la ekzemploj kun *da* ĉerpitaj el EKZ en (2.5):

(a) Frazoj en kiuj la aldono de *ia* bone aŭ akcepteble bone sidas, kaj tial la uzo de *da* iĝas konfirmata:

Un centon da iaj pomoj.- Du dekduojn da iaj forkoj.- Amaso da iaj homoj.- Multe / multo / multego / kelke / [iom] da iaj diamantoj / mono / pakaĵo.- Un metro da ia nigra drapo.- Grandan serion da iaj aliaj pronomoj.-

[[Temas pri frazoj en kiuj ekzistas neniu plia vorto inter *da* kaj la substantivo ĝin sekvanta (kiel en *da pomoj*), aŭ kun intermetita epiteto (kiel en *da nigra drapo*), aŭ kun intermetita nedifina vorto parenca al *ia* (kiel en *da aliaj pronomoj*)].

.....

(b) Frazo kiu ne akceptas la almeton de *ia*:

Kvar metroj da ia tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn.

La ne-akcepto ja venas de la logika kontraŭdiro inter la nedifina senco de *ia*, kaj la difina senco de *tiu ĉi*.– Sekve, *da* ne estas uzebla en tia frazo, tiel ke la ĝusta PAG/PIV-formo estas *Kvar metroj de tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn.* (Vidu (5.8.7)).

Rim.– La kurtigita frazo *Kvar metroj da ŝtofo kostas naŭ frankojn* povus esti familiara alternativo por *Kvar metroj da/de tiu ĉi ŝtofo* aŭ *Kvar metroj da/de la ŝtofo* [pri kiu ni ĉiuj jam scias].•

.....

(c) Frazoj kun strukturo analoga al tiu de *Monato estas parto/[kvanto] da tempo*:

Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo.

En la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis du pafojn.

-- En kvanto *da ia tempo*, *ducent kilometrojn da ia longo*, *kelke da iaj minutoj* jen tiuj *ia(j)* propre ne bone sidas, ĉar ekzistas nur un speco de tempo, de longo, de minutoj. Sed *tempo*, *longo* kaj la plurala *minutoj* ja estas nedifinitaj tutaj, kaj tial la uzo de *da* estas kohera kun la dirita egalaĵo.

.....

(d) La vorto antaŭ *da* estas frakcia nombro (ono):

La DL prezentas la ekzemplon *Mi revenos post kvarono da horo*, kaj al tio kontrastas la ekzemplo el EKZ *Un tago estas 365-ono aŭ 366-ono de jaro.*

Nu, dum en *kelke da minutoj* tiu plurala *minutoj* estas nedifinita tuto, jen la singulara *horo* en *kvarono da/de horo* certe ne estas nedifinita tuto, kaj tio kuntrenas, ke en tiu esprimo oni ne uzu *da*, sed *de*. (Vidu (5.8.8)).

.....

(4.2.10).– En rilato al [12, 13]: Kontraŭe

<i>de la</i>	[difina <i>la</i>]
--------------	---------------------

al la sekvoj de la *nedifina* signifo de *ia* en *da* = *da ia*, jen la *difina* signifo de *la* en la frazo ĉi-apuda kuntrenas, ke la priparolata viando estas *difinita tuto*.

Krome, [[kvankam tiu *peco* ja plu estas kvanto]], jen en ĉi frazoj –laŭ [12]– ĝin ni simple konsideras parto prenita *de/el* la dirita tuto (aŭ, alivorte, ke ni ĝin simple konsideras parto *de* tiu tuto)

Peco de la viando kiun mi havas antaŭ mi
 [[“Peco” estas parto prenita de/el la *difinita tuto* “viando”]].
 [[Limigita apartaĵo de difinita viando]]
 (Vidu (5.8)).

(4.2.11).– La una ĉi-apuda esprimo ja estas analoga al tiu en la ĵusa ĉelo,

kvankam pro la eta demonstrativa forto de

Peco de la viando.
Peco de tiu ĉi viando, Peco de mia viando, ktp.
La prezo de la viando estas po 15 eŭroj ĉiu kilo.

la artikolo *la*, jen en la realo ĝi povus esti efike uzata nur, se ĉiuj kunparolantoj ial scias, pri 'kiu viando fakte temas.

(La sama problemo doniĝas en la frazo pri la prezo de la viando, kvankam ĝi estas frazo de alia speco ol tiu pri kiu ni nun okupiĝas). (Vidu (5.8.11)).

-- En EKZ kaj en DL ekzistas neniu ekzemplo en kiu aperus esprimo *parto/peco/kvanto de/da la* (sekve, same okazas en (1.1) kaj (1.5)).

☞ [[La efiko de *la* pri *difinita tuto* ja ne venas de tio, ke *la* estas artikolo, sed de tio, ke ĝi estas *difina* artikolo. Nu, tian saman efikon havas ĉia vorto aŭ esprimo kun *difina* signifo (*tiu ĉi, mia, ktp*) venanta post *da* antaŭ la substantivo]]. [[Krome, ĉar tiuj vortoj havas grandan difinan forton, jen tiuj kurtaj frazoj sufiĉas por efika komunikado –tial, sen bezono almeti klarigojn kiel “kiujn mi havas antaŭ mi” k.s.]].

[[Plu krome: Jen ni alivoje venas al konverĝo kun la rezulto, ke anstat *Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo* oni prefere diru *Kvar metroj de tiu ĉi ŝtofo*]].

(4.2.12).– En rilato al [1, 2, 3]:

Mi preferas la esprimon <i>Dum la frua parto de la jaro</i> [[= <i>Dum la fruaj monatoj de la jaro</i>]], ĉar en ĝi temas pri parolo pri limigita apartaĵo [[de la jaro]].	La esprimo <i>Dum la frua parto da la jaro</i> [[= <i>Dum la fruaj monatoj da la jaro</i>]] ŝajnas al mi nebona, ĉar en ĝi ne temas pri mezuro [[de io ajn]].
[[Kongrue kun <i>Januaro estas la una monato de la jaro</i> . (EKZ)].	[[Al tio ĉi respondus la [[evidente erara]] <i>Januaro estas la una monato da la jaro</i>]].

Rim.– [i] Se en la dua frazo ni metas *Dum la frua parto da ia la jaro*, jen ni venas al logika kontraŭdiro inter la *nedifinia ia* kaj la *difina la* (kio ja estas afero samfamilia al la kontraŭdiro kiun en (4.2.9)(b) ni vidis en la frazo *Kvar metroj da ia tiu ĉi ŝtofo*).•

[ii] En la frazo *peco de la viando, kiun mi havas antaŭ mi* ja certe temas pri "limigita apartaĵo de difinita viando" (tiel ke oni povus diri *Peco el la viando, kiun mi havas antaŭ mi*).

Sed en la frazo *dum la frua parto de la jaro* propre ne temas pri "limigita apartaĵo" de la jaro, sed pri "speciale montrita parto" de la jaro (tiel ke oni apene povus diri *dum la frua parto el la jaro*).•

(4.2.13).– En rilato al [14, 15, 16, 17]: Ĉi lasta parto de la LR ne bezonas komenton: "La kombinaĵo *da la* teorie ne estas malpersata, sed en la praktiko ĝi estas uzebla tiel malofte, ke ni povas simple konsili neniam uzi ĝin (krom la okazoj, en kiuj la senco tion ĉi nepre postulas).

Rim.– [ij] Bedaŭre, ke Z. ne prezentas mem ekzemplon en kiu neprus uzado de *da la*.

[[Supozeble, por li tia kombinaĵo estas simple neebla, pro la interna kontraŭdiro traktita en (4.2.12)[ij]].•

.....
(4.3) Komplementaj notoj pri LR.16.

(4.3.1) 🍷 [[Ĉi kompleksa LR.16 havas tre specialan kaj apartan gravecon, ĉar ĝi estas la rezulto de [[longe prinpensita]] gramatikista esplorado fare de Zamenhof mem.– Ĝi, tial, devus esti eksplice citata de ĉiu E gramatiko, kun precize motivita indiko, pri 'kiujn ties eroj oni plene aŭ nur parte akceptas aŭ malakceptas]].

.....
(4.3.2) [[Oni povus provi argumenti jene kontraŭ la egalajho *da = da ia*]]: Ja veras, ke *peco da viando* havas la signifon *peco da ia viando*, sed ne pro tio, ke *da* implicus la signifon *ia*, sed simple pro tio, ke en *peco da viando* la vorton "viando" ne antaŭas la difina artikolo *la* aŭ aliu difina determinanto (*mia, tiu ĉi*, ktp), kaj ke, en E, tio kuntrenas nedifinan signifon (analoge al "Artikolo nedifinita ne ekzistas" (PGE.1)).

Laŭ tio, jen ambaj alternativoj *peco de la / da la viando kiun mi havas antaŭ mi* kiel *dum la frua parto de la / da la jaro* estus allaseblaj, kun signifo pri "(difinita) limigita apartaĵo/ speciale montrita parto" se oni uzas *de*, ka pri "mezuro, [[kvanto]]" se oni uzas *da*.•

.....
(4.3.3) [[Ni analizas iom pli detale pri la supre traktita kontrasto inter viando kiel nedifinita aŭ kiel difinita tuto]].

La kvar ĉi-apudajn frazojn ni dividas pere de krampoj en la sub-esprimojn

semantikajn (kaj intonaciajn) kiujn nia kompreno de ordinaraj parolantoj konstatas en ili.

- | |
|--|
| <ul style="list-style-type: none"> • [[(<i>La peco da (ia) viando</i>) (<i>kiun mi havas antaŭ mi</i>)]] • [[(<i>La du funtoj da (ia) viando</i>) (<i>kiujn mi havas antaŭ mi</i>)]] |
| <ul style="list-style-type: none"> • [[(<i>La peco de/el (la viando kiun mi havas antaŭ mi)</i>)]] • [[(<i>La du funtoj de/el (la viando kiun mi havas antaŭ mi)</i>)]] |

• La kontrasto singularo/pluralo en la pronomoj *kiun / kiujn* en la una ĉelo klare pruvas ke tio, kiu estas antaŭ mi, respektive estas *La peco da (ia) viando* kaj *La du funtoj da (ia) viando*. Kaj ja ambakaze temas pri ia nedifinita viando.

• Diference, la komuna singulara pronomo *kiun* en la dua ĉelo klare pruvas, ke tio, kiu estas antaŭ mi, ambakaze estas *la viando kiun mi havas antaŭ mi* (kiu, tial, ambakaze estas difinita viando).

Rim.– Tiaj diferencoj semantikaj kaj intonaciaj ne ŝuldiĝas al la efiko de la kontrasto *de/da*, kiel anke ne al variado en la formo de la de la rilativo *kiu(j)n*, sed al ĉeesto aŭ ne-ĉeesto de la difina artikolo *la*.

- | |
|--|
| <ul style="list-style-type: none"> • (<i>El trozo de carne</i>) (<i>que tengo ante mí</i>). • (<i>Las dos libras de carne</i>) (<i>que tengo ante mí</i>). |
| <ul style="list-style-type: none"> • (<i>El trozo de (la carne que tengo ante mí)</i>). • (<i>Las dos libras de (la carne que tengo ante mí)</i>). |

-- Por konfirmo, jen ĉi-apude tiuj frazoj en la H, uzanta en ĉiuj kazoj nur la prepozicion **de**, kaj ĉiukaze la nevarian rilatigon *que*.•

.....

🔴 (4.3.4) [[Mi opinias ke, aldone al tiuj jam ekzistantaj vortoj *parto* kaj *peco*, utilis enkonduko de specifa neologismo por la baza signifo de ĉi-apudaj H, F, A vortoj, do por la signifo

- H *pedazo/ trozo/ cacho*, F *morceau*, A *bit / chunk*
- [[*Pedazo/ morceau/ chunk/ (peco) da* pano, *da* melono, *de* rompita vazo]].
- [[Ĉiu A *chunk* ja estas iu E *peco*, sed ne ĉiu E *peco* estas iu A *chunk*]].•

"derompaĵo", "detranĉaĵo", "deprenaĵo", k.s., sen bezono uzi la specife konkretajn radikojn *romp'*, *tranĉ'*, *pren'*]].•

(5) Pri **de** kaj **da** laŭ PAG.313.314 kaj PIV.

(5.1) Enkondukaj ĝeneralaĵoj:

-- En la konstruoj "*substantiva sintagmo + prepozicio + substantiva sintagmo*" kiel en ĉi apudaj ekzemploj, la sintagmo antaŭ la prepozicio estas nomata "determinato", kaj tiu post la prepozicio estas nomata "(prepozitiva) suplemento de la determinato"

- | | |
|---|----------------------------|
| • <i>Botelo de</i> Petro | • <i>Bukedo de</i> floroj |
| • <i>Botelo el</i> vitro | • <i>Bukedo el</i> floroj |
| • <i>Botelo de/por</i> vino | • <i>Bukedo da</i> floroj |
| • <i>Botelo da</i> vino | • <i>Bukedo por</i> ornamo |
| • <i>Botelo kun</i> vino | • <i>Bukedo sen</i> gracio |
| • <i>Botelo sen</i> vino | • <i>Bukedo en</i> vazo |
| • <i>Granda botelo da</i> tre kosta rejna vino. | |

Rim.– Se pro kunteksto la afero estas sufiĉe klara, jen oni kutime simple diras "substantivo" anstataŭ "substantiva sintagmo".•

-- La baza plej ĝenerala ligilo inter du substantivoj estas la multsignifa prepozicio **de**, sed ja tre ofte konvenas aŭ nepras pli preciza prepozicio.

-- Tre ofte la prepozitiva suplemento povas ricevi sinoniman formon de adjektiva suplemento (kiel *bukedo el floroj = flora bukedo*, *bukedo por ornamo = (por)ornama bukedo*).

Ofta plia alternativo estas uzado de kunmetitaj vortoj: *botelo de vino = vinbotelo*, aŭ *bukedo de/el floroj = florbukedo*.– (PGE.11: "Vortoj kunmetitaj... la ĉefa vorto staras en la fino").

.....

(5.2) Koncerne la sintaksan rolon kiun prepozicioj ludas en la ĵus traktitaj konstruoj, jen tiuj dividiĝas en du malsamajn grupojn: La unu grupo konsistas nur el la prepozicio **da**, kaj la dua grupo el ĉiuj ceteraj prepozicioj.

Tial, la prepozicion **da** oni devas studi aparte de ĉiuj ceteraj prepozicioj.

.....

(5.3) Tiaj prepoziciaj konstruoj estas ĝenerale rekte facile uzeblaj kaj kompreneblaj krom en la kazoj en kiuj temas pri mezuro, kvanto, k.s.

Kaj ĝuste nur pri tiaj problemaj kazoj ni interesiĝas en ĉi paĝoj.

.....

(5.4) Jen kelkaj pliaj ekzemploj kun prepozicioj aliaj ol **da**:

<ul style="list-style-type: none"> • Vesto <i>de</i> Petro • Vesto <i>de</i> bela aspekto • Vesto <i>de</i> granda prezo • Vesto <i>de</i> tre leĝera pezo 	<ul style="list-style-type: none"> • Vesto <i>de</i> cent eŭroj • Vesto <i>de/el</i> tri pecoj • Vesto <i>el</i> kotono (kotonvesto) • Vesto <i>el</i> Parizo (Pariza vesto) 	<ul style="list-style-type: none"> • Vesto <i>por</i> balo (balvesto) • Vesto <i>kun</i> multaj butonoj • Vesto <i>en</i> bona stato • Vestoj <i>po</i> cent eŭroj
<p>En ĉiuj ekzemploj la ĉefa vorto estas la determinato "vesto" (t.e., ili principe parolas pri vestoj, kiuj havas diversajn ecojn laŭ la respektivaj suplementoj): <i>Vesto belaspekta, grandpreza, leĝerpeza, cent-eŭra, tripeca, kotona, Pariza, porbala, multbutona, bonstata.</i></p>		
<p>Ĉe detala analizo/priskribo oni precizigas "suplemento pri posedanto de la determinato", "suplemento de konsisto de la determinato", "suplemento de mezuro de la determinato", "suplemento de mezuro de la pezo de la determinato", ktp.</p>		

.....

(5.5) Pliaj ekzemploj:

<ul style="list-style-type: none"> • Libro <i>pri</i> kemio • Vojo <i>al</i> Parizo • Pezo <i>de</i> ŝtono • Distanco <i>de</i> tri metroj (= 3-metra distanco) • Festo <i>en</i> dimanĉo (= dimanĉa festo) 	<ul style="list-style-type: none"> • Manko <i>de</i> forto (= fortomanko) • Fonto <i>de</i> energio (= energifonto) • Daŭro <i>de</i> du horoj (= duhora daŭro) • Specoj <i>de</i> bestoj (= besto-specoj) • Restadejo <i>de</i> bestoj (=bestoj-restadejo)
--	--

.....

(5.6) Aldonaĵo pri kunmetitaj vortoj.

Jen ekzemploj pri malsamaj gradoj de kondensiteco en la signifo de kunmetaĵoj:

<ul style="list-style-type: none"> • skrib(o)tablo • internacia • tutmonda • untaga • unataga 	<ul style="list-style-type: none"> • matenmanĝi • abonpago • maŝinpeco • senforta 	<ul style="list-style-type: none"> • vaporforto • vaporŝipo • velŝipo 	<ul style="list-style-type: none"> • paperfabriko • papersaketo • paperujo • paperkorbo 	<ul style="list-style-type: none"> • vortaro • vortofamilio • vortoklaso
--	---	--	---	---

Nu, en la sekvaĵo ni konstatos, ke ni bezonos okupiĝi nur pri tre simplaj kazoj de kunmetitaj vortoj.

.....

(5.7) Per ĉi lasta sekcio finiĝas la enkondukaj ĝeneralaĵoj, kaj jen ni komencas la studon de la temo grava por ĉi paĝoj:

-- Nia nuna temo konsistas en la parolo pri kvanto, mezuro, k.s. pere de prepozicioj.

-- La prepozicio *da* ĉiukaze rilatas al tiu temo, kaj la multsignifa prepozicio *de* tre ofte rilatas al ĝi. Anke *kun* kaj eĉ *sen* povas rilati.

-- Nu, en la sekvaĵo temas nur pri *da* kaj *de* en rilato al kvanto, mezuro, k.s.

.....

(5.8) Jena tabelo prezentas nur la kernon de nia nuna temo.

Rim.– Mi anstatigas la ekzemplojn de PAG per aliaj respektive samstrukturaj tamen parencaj inter si laŭ enhavo, kun celo pli klare kaj sisteme manipuli la kompleksan tuton de la diversaj ekzemploj de la fonto.

Sed la eksplikoj pri la signifo de la ekzemplaj frazoj ja estas tiuj de PAG. •

Laŭ PAG.133.C.c	Laŭ PAG.133.H
<p>^m</p> <ul style="list-style-type: none"> • <i>Pan(bul)o de tri funtoj.</i> (La suplemento tri funtoj indikas la mezuron (de la pezo) de la determinato <i>pan(bul)o</i>). <p>(Suplemento de/pri mezuro de la determinato).</p>	<p>[[Egale ol en (4.2.7)]]:</p> <ul style="list-style-type: none"> • <i>Tri funtoj da pano.</i> [[= <i>Tri funtoj da ia pano</i>]]. • <i>Iom da pano.</i> [[= <i>Iom da ia pano</i>]] • <i>Peco da pano.</i> [[= <i>Peco da ia pano</i>]]. • [[(<i>La peco da (ia) pano</i>) (kiun mi havas antaŭ mi)]]]. (Vidu (4.3.3)) <p>(La determinatoj tri funtoj, iom kaj peco indikas, laŭ la kazoj, difinitan aŭ pli-malpli difinitan mezuron, nombron, kvanton prenitajn [[aŭ kiun ni konsideras prenitajn]] el nedifinita tuto indikata de la suplemento "pano").</p> <hr/> <p>[[Egale ol en (4.2.10)]]:</p> <ul style="list-style-type: none"> • <i>Tri funtoj de la pano kiun mi havas antaŭ mi.</i> • <i>Iom de la pano kiun mi havas antaŭ mi.</i> • (<i>Peco de/el (la) pano kiun mi havas antaŭ mi</i>). (Vidu (4.3.3)) <p>(La determinatoj tri funtoj, iom kaj peco indikas, laŭ la kazoj, difinitan aŭ pli-malpli difinitan parton de difinita tuto indikata de la suplemento "la pano kiun mi havas antaŭ mi").</p>

-- En la tujsekva sekcio ni detale traktos la tri partojn de ĉi tabelo, kaj en la postaj sekcioj ni grade malvolvos la temon.

.....

(5.8.1) Detale pri konstruado de la ekzemplo en la unua fako de la tabelo:

<ul style="list-style-type: none"> • Pano <i>el</i> tritiko [1] • Bulo <i>de/el</i> pano (= panbulo) • Panbulo/pano [2] • Pan(bul)o <i>el</i> tritiko • Pan(bul)o <i>de</i> bruna koloro [3] 	<ul style="list-style-type: none"> • Pezo <i>de</i> tri funtoj [4] • Pan(bul)o havanta pezon <i>de</i> tri funtoj • Pan(bul)o <i>de/kun</i> pezo <i>de</i> tri funtoj • 🐞 Pan(bul)o <i>de</i> tri funtoj [5] • Pan(bul)o <i>de</i> tri funtoj <i>da</i> pezo. (Vidu (2.6)) • La pezo <i>de la</i> pan(bul)o estas tri funtoj. [6]
<ul style="list-style-type: none"> • Pano tritika.– Pan(bul)o tritika, brunkolora, trifunta 	

[1] Laŭ la ekzemplo ... *ili ne ĉiam estas faritaj el tolo.* (EKZ)

[2] "Pano" ofte uzatas kun signifo de "panbulo", kiel en *Jen prenu ankore du panojn.* (Z.)

[3] Laŭ *Li estas [[knabo]] de meza kresko.* (EKZ)

[4] Laŭ ... *la pezon de duono de siklo ... la pezon de dek sikloj da oro.* (Bib)

[5] Laŭ *Jara salajro de tri mil kronoj* (Z.).– (Tiu ĉi estas un el la ekzemploj de PAG).

[6] Laŭ *La pezo de la kirasos estis kvin mil sikloj da kupro.* (Bib).

.....

(5.8.2) Pri la ekzemploj en la dua fako de la tabelo:

-- *Tri funtoj da (ia) pano kaj lom da (ia) pano* ja laŭas *[Un] funto da viando* (UV) kaj *Peco da (ia) viando* (4.2.7).

-- 🐞 Laŭvorte el PAG.113.H: "... la uzo de *da* estas limigita per du kondiĉoj: 1. la antaŭa substantivo [[determinato]] devas havi signifon de mezuro [[aŭ de nombro aŭ kvanto]]; 2. la posta substantivo (suplemento) devas esti *nepre nedifinita*". (Vidu (4.2.7)).

-- 🐞 [[PAG konstatas, ke LR.16.[9, 10, 11] eksplice parolas pri tio rilata al la sintagmo venanta **post da**, kaj ke ĝi implice parolas anke pri afero jam antaŭe traktita en UV kaj EKZ, nome, pri tio rilata al la sintagmo venanta **antaŭ da**]]. [[Nu, en la ĵusa alineo ĝi trafas metas kunaj kaj eksplicaj ambajn aferojn, krome pere de la klara kaj preciza esprimo "la uzo de *da* estas limigita per jenaj du kondiĉoj"]].

[[Mia redakto de (4.2.7) ja paŭzas la strukturon de ĉi alineo de PAG, kiel anke tiun precizan esprimon ĝian]].

-- 🐞 [[En tiu PAG-redakto ne aperas, tamen, parolo pri tiu *da = da ia* laŭ LR.16]]:

- *Tri funtoj da pano = Tri funtoj da ia pano.*
- *Monato estas parto/[[kvanto]] da tempo.*

[[Nu, tio venas de la konstato ke, parolante nur pri "nepre nedifinita suplemento", jen oni inkludas ne nur la frazojn kiuj allasas enmeton de la nedifina vorto *ia*, sed anke tiujn kiuj tian almeton ne allasas]].

Por ekzemplo, tiun *kvanto da tempo* ni ne povus aliigi al *kvanto da ia tempo* (ĉar ekzistas nur un tempo-speco), sed "tempo" ja estas ia nedifinita tuto.

Rim.– 🐞 [i] [[Kiel jam dirite en (4)[ii], ja estas tamen surprize, ke PAG/PIV ne citas la LR.16, ne citas la kontraston *mezuro kontraŭ (difinita) limigita apartaĵo/ speciale montrita parto*, ne citas la egalajon *da = da ia*, kaj eĉ ne prezentas la kerne gravajn ekzemplojn *dum la frua parto de la jaro kaj peco de la viando, kiun mi havas antaŭ mi*]].

[[Tio sama okazas anke en RV]].•

[ii] En rilato al *da*, PAG parolas anke pri "Suplemento de mezuriteco [de la determinato]", sed mi ne sukcesas bone kompreni la koncernajn eksplikojn. •

[iii] Jen la priskribo en PIV pri la signifo/rolo de *da*: "Prepozicio uzata por rilatigi du vortojn aŭ sintagmojn, el kiuj la una esprimas mezuron (kvanton, pezon, longon, volumenon k.a.) de la dua". – Kaj inter la ekzemploj: *Un kilogramo da teo*.

Nu, se harfendi, jen la determinato *Un kilogramo* ja esprimas mezuron de ia kvanto, tamen ĝi ne esprimas mezuron de la suplemento *teo*, sed mezuron de difinita kvanto prenita el nedifinita tuto esprimata de la suplemento *teo*. •

(5.8.3) Kaj pri la ekzemploj en la tria fako de la tabelo:

-- 🍷 *Tri funtoj de la pano kiun mi havas antaŭ mi* ja estas laŭ *Peco de la viando, kiun mi havas antaŭ mi* laŭ (4.2.10).

-- 🍷 Tiu "difinita parto" en la ekspliko pri ĉi ekzemplo ja estas [[akcepto]] kun revortigo de tiuj "(difinita) limigita apartaĵo" kaj "speciale montrita parto" en LR.16.

(5.8.4) Ĉi-apude ni ripetas la unan ekzemplon de la tabelo, kaj almetas la samspecajn ekzemplojn de PAG.

(La suplemento mezuras la determinaton = la suplemento estas la mezuro de la determinato).

- *Pan(bul)o de tri funtoj.*
- *Longo de tri metroj.*
- *Vojo de tri tagoj en la dezerto. (Z.)*
- *Jara salajro de tri mil kronoj. (Z.)*
- *Atingi la aĝon de okdek jaroj.*

(5.8.5) Ekzemploj pri **kvantoj** prenitaĵ el **nedifinita** tuto (laŭ la dua fako de la tabelo):

<ul style="list-style-type: none"> • <i>Tri funtoj da pano.</i> • <i>Peco da pano.</i> • <i>Tri jaroj da laborado.</i> • <i>Mi aĉetis dekduon (aŭ dek-duon) da kuleroj kaj du dekduojn da forkoj. (EKZ)</i> • <i>Dekmiloj da dekmiloj staris antaŭ li (Z). (Bib) Dan 7:10</i> • <i>[[Dekmiloj da dekmiloj da steloj]].</i> • <i>[[Dekoj da miloj da kestoj da boteloj da vino / da vino de nia marko/ de nia vino]]</i> • <i>La difinitan nombron da brikoj liveru. (Z.)</i> • <i>Granda nombro da homoj. (Bib)</i> 	<ul style="list-style-type: none"> • <i>lom da pano.- Multe/multo da pano.</i> • <i>lom da amikoj.- Multe/multo da amikoj.</i> • <i>Pli da pano.– Pli da amikoj.</i> • <i>En la plimulto da okazoj. (Z)</i> • <i>[[Sufiĉe da pano]].</i> • <i>Aroj da bellanaj ŝafoj. (EKZ)</i> • <i>Granda serio da pafilegoj. (EKZ)</i> • <i>Aro da reguloj.– [[Aro de/el 16 reguloj]]</i> • <i>Paĝo da teksto.</i> • <i>Karavano da Iŝmaelidoj. (Bib).</i> • <i>Maro da mizeroj. (Z.) [[=Multego da mizeroj]].</i>
--	--

-- Kvankam la preskriboj pri la rolo de *da* en UV, EKZ kaj LR.16 parolas nur pri signifo de nombro, mezuro, [[kvanto]], parto, k.s. de la determinato (anke pri eventuala rolo de la ujoj), ja tre ofte okazas ke, kadre de adekvata kunteksto, tian signifon povas ricevi anke aliaj vortoj (kiel *aro*, *serio*, *karavano*, *maro*, *bukedo*, *paĝo*, *plenmano/ manpleno*, *glaso*, *botelo*, *guto*, ktp).

.....

(5.8.6) 🍷 RV atentigas en (8.2) pri la fakto, ke PAG/PIV ne malvolvas pri la kazoj, en kiuj al la baza signifo pri kvanto kaj mezuro de *da* algluiĝas anke parolo pri ujoj.

- *Glaso da vino.* (EKZ)
- *Glaspleno da vino.*
- *Skatolo da bombonoj.*
- *Skatolpleno da bombonoj.*

-- Nu, laŭ PAG.120: "Ni ne klarigas ĉi tie la signifojn de ĉiuj prepozicioj: tio estas ja la tasko de vortaro; en la "Plena Ilustrita Vortaro" oni trovas detale eksplikitan la uzadon de la unopaj prepozicioj".

Laŭ tio, PAG.133.C.c kaj PAG.133.H sin okupas ĉefe nur pri la reguloj pri kontrasta uzado de *de* kaj *da*, kaj nur preterpase diras, ekzemple, ke *plenmano*, *botelo*, *paĝo* estas uzeblaj por esprimado de proksimuma mezuro, ktp., k.s. Kaj PIV prezentas ekzemplojn preske nur pri la baza rolo de *da*, nur kun disaj ekzemploj pri ties larĝa rolo. (Mi tie trovis neniun ekzemplon pri ties kompleksa rolo –supozeble, ĉar tiaj ne abundas tra la tuta verkaro en E).

-- [[Tamen, efektive, ja estas manko en PAG/PIV, ke ili ne havas sekcion specife dediĉitan al la tri roloj de la prepozicio *da* kaj al prezentado de kontrastaj ekzemplaj frazoj]].

.....

(5.8.7) Kaj jen ekzemploj pri *partoj* de *difinita* tuto (laŭ la tria fako de la tabelo):

🍷 -- Jen PAG [[plene akceptas kaj ĝeneraligas]] plian eron de LR.16:
 (a) Z. pravigas tiun "*de la* pano" anstataŭ "*da la* pano" ĉar la *difina* artikolo *la* antaŭ la suplemento "pano" kuntrenas, ke tiu suplemento estas *difinita* tuto, tiel ke la determinato "tri funtoj" propre ne estas "mezuro", sed "(limigita) difinita apartaĵo" aŭ "speciale

- *Tri funtoj de la pano kiun mi ĵus aĉetis.*
- *Tri funtoj de tiu pano.*
- *Tri funtoj de mia pano.*
- *Tri jaroj de mia laborado.*
- *La nombro de ĉiuj animoj de liaj filoj kaj filinoj estis tridek tri.* (Bib)
- [[*Kvar metroj de tiu ĉi ŝtofo*]] ("*da*" en EKZ)
- *La granda plimulto de la personoj, kiuj batalas por E.* (Z)

montrita parto" de tiu suplemento. (Vidu (4.2.10)).

- *Ein Kilo dieses Fleisches = Un kilogramo de tiu ĉi viando.*
- *Ein Glas dieses Tees = Un glaso de tiu ĉi teo.* (Vidu (2.1))

(b) 🍷 [[Nu, tia efiko de *la* ne kuŝas en tio, ke ĝi estas artikolo, sed en tio, ke ĝi estas *difina* artikolo, kaj tian saman efikon havas ĉia *difina* determinanto antaŭ la suplemento (nome, la pronomoj aŭ adjektivoj montraj, personaj, posedaj kaj nombraj]]. (Vidu (4.2.11)).

-- [[Krome, en tiaj frazoj ofte eblas anke uzo de *el* anstataŭ *de*, kun apena diferenco de signifo]].

- [[*Tri funtoj de/el la pano kiun mi ĵus aĉetis*]].
- [[*Mi manĝis iom de/el tiu pano*]].

<ul style="list-style-type: none"> • Rento de 600 frankoj. • Febro de 39 gradoj C. • En la kvanto de 135 mil litroj. (Z). • Libro de 196 paĝoj/ de ĉirkaŭ 200 paĝoj/ de du centoj da paĝoj. • Mi volus scii, kiom de la ŝtofo ili jam pretigis. (Z.) • [[Mi sendas al vi 30 botelojn da vino, de po 1'5 litroj]]. [[aŭ: ... da vino, de 1'5 litroj ĉiu]]. 	<ul style="list-style-type: none"> • 600 frankoj da rento. • 39 gradoj C da febro. • La kvanto de [[da]] E-parolantoj multiĝos. (Vik) • Kiom da lingvoj vi parolas?. (Fa) • Karavano da Ismaelidoj. (Bib). • Nur kelkaj partianoj/ Nur kelke da partianoj. • Granda nombro da partianoj. • En la plimulto da okazoj. (Z.) • [[Grandan kvanton da tempo mi vane perdis]]
	<ul style="list-style-type: none"> • Granda amaso el la Izraelidoj. (Z) • Nur kelkaj el la / el ĉiuj / el niaj / el ĉiuj niaj partianoj. • La nombro de niaj partianoj. (Z.) • La nombro de tiuj homoj estas tre granda. • La tuto de niaj partianoj. • La granda plimulto de la personoj, kiuj batalas por E. (Z.) • [[Grandan parton de la disponata tempo mi vane perdis]]

.....

(5.8.8) Plue laŭ PAG: Post frakcioj *duono*, *triono*, ktp oni ĉiam devas uzi **de** kaj ne **da**, ĉar frakcioj estas frakcioj de difinita tuto. (Vidu (4.2.9)(d)).

<ul style="list-style-type: none"> • [[Kvaronjaro = kvarono de jaro = kvarona jaro = trimonato]]. • Duono de paĝo. • Se duono de ni mortos. (BibX) kaj (Bib) • Mi legis nur duonon de tiu paĝo. • Mi legis nur la duan duonon de la paĝo 33a. • La duono de mia pano. 	<ul style="list-style-type: none"> • La tuto de mia pano. • La duoblo de mia pano. • Duonmetro = Duono de metro • Duono de metro da ŝtofo. • Duono de metro de tiu ĉi ŝtofo.
<ul style="list-style-type: none"> • Un tago estas 365-ono aŭ 366-ono de jaro. (EKZ) • Mi revenos post kvarono da horo. (DL).– [Ja prefere kvarono de horo]. • Bela vizaĝo estas duono da doto. (PE).– [PIV skribas: duono da (de) doto]. • (Sed): Tiu metalo konsistas el du trionoj da oro kaj un [[triono]] da arĝento. • La tutajhon de la ŝipoj de iu lando oni nomas ŝiparo. (Fa) 	
<ul style="list-style-type: none"> • Tri estas duono de ses. (EKZ) • [[Tri pomoj estas la duono de ses pomoj]]. • [[Ses pomoj estas la duoblo de tri pomoj]]. • Libro de 196 paĝoj / de ĉirkaŭ 200 paĝoj / de du centoj da paĝoj. 	

.....

(5.8.9) Laŭvorte el PAG:

"Kelkaj atribuas la saman valoron [[kiel ĉe ono]] al *parto*, *frakcio*, *sekcio*, [[peco]], kaj post tiuj vortoj uzas nur **de**".

- Januaro estas parto **de** jaro. (LR.16)
- Printempo estas parto **de** jaro. (LR.16)
- [[Monato, kvaronjaro, semajno, tago, horo, ... estas partoj **de** jaro]]. (Laŭ LR.16 temus pri partoj **da** jaro).
- Monato, [[jaro, kvaronjaro, semajno, tago, horo, ...]] estas partoj / [[kvantoj]] **da** tempo. (LR.16)
- [[Kvaronjaro = kvarono **de** jaro = trimonato]].
- Kvaronjaro estas parto **de** la jaro. (Z) **[*]**
- [[Mi manĝis panpecon (pecon **da/de** pano)]. (Vidu (6.2)).

[*] Ĉi zamenhofan ekzemplon registras PIV (en la artikolo "la"), sed mi ne sukcesis trovi la fontoverkon en la Interreto.

-- [[Pliaj ekzemploj: En la ekzemploj de la una ĉi-sekva linio, la vortoj *parto* kaj *triono* havas signifon de *difinita limigita apartaĵo*. En tiuj de la dua kaj tria linioj ĝi havas signifon de *mezuro*]]. (LR.16)

- [[Mi manĝis parton **de** la terpomoj / Mi manĝis un trionon **de** la terpomoj]].
- En la proporcio de un parto **da** terpomoj al du partoj **da** viando. (Int)
- [[En la proporcio de un triono **da** terpomoj al du trionoj **da** viando]].

.....

(5.8.10) [[Jen bela kolekto da Z. frazoj en kiuj rolas la vorto "kolekto"]]:

La suplementoj estas *nedifinitaj tutoj* en la ekzemploj de la una

una ĉelo, kaj *difinitaj tutoj* en tiuj de la dua.– Kaj en la kvina ekzemplo vidiĝas erara uzo de *de* anstat *da*.

- *Malgranda kolekto da homoj.* (Z.)
- *Tiu frazo estas nur bele sonanta kolekto da vortoj.* (Z.)

- *La plena kolekto de komedioj de Holberg.* (Z.)
- *Kongreso, t.e., kolekto de 20–30 personoj.* (Z.)

- *Plena kolekto de [da] krispigiloj de haroj.* (Z.)

(5.8.11) [[Pro la eta demonstra

forto de la artikolo *la*, jen tiuj du simplaj, lastaj frazoj de ĉi tabelo, *Mi prenis pecon de la viando* kaj *La prezo de la viando estas ...*, estas direblaj nur ĉe kunteksto aŭ situacio

en kiu por ĉiuj kunparolantoj ial estas klare, pri 'kiu viando fakte temas]]. (Vidu (4.2.11)).

- *Mi prenis pecon da viando.*

- *Mi prenis pecon de tiu ĉi viando.*
- *Mi prenis pecon de via viando.*
- *Mi prenis pecon de la viando, kiun mi havas antaŭ mi.*
- *Mi prenis pecon de la viando.*

- [[*La prezo de la viando estas po 15 eŭroj ĉiu kilo*]]

.....

(5.8.12) 🐞 Laŭvorte el PAG.113.H: "La supraj distingo kaj malpermesoj [[pri la kontrasto *de/da*]], kiujn difinis iom post iom la uzado de la plej bonaj aŭtoroj, liveras praktikan, tute certan regulon kaj ĉiam obeindan".

[[Ĉe tio ni rimarku, ke tiu "tute certa regulo" ekzistas jam de tre, tre longa tempo (almene, evidente, ekde la apero de LR.16), kaj ke ĝi kontribuas al nuancita parolo]].

-- [[Jen almenaŭ ĉi tie PAG devus fari eksplican citon pri LR.16 !!!]].

(5.8.13) [[Kelkaj interesaj ekzemploj]].

Ekzemploj pri maloftaj uzoj de *da*.

- *Mi faros, ke da vidvinoj ĉe ili estos pli ol da sablo ĉe la maro.* (Bib)
(= *Mi faros, ke ĉe ili estos pli da vidvinoj, ol (kiom) da sablo [estas] ĉe la maro*).

- *Multon da bona kaj feliĉa mi ĝuis en vi, hejma domo!* (Z.) (= *multon da bono kaj feliĉo, multon da bonaĵoj kaj feliĉaĵoj*).

- *Da ĉevaloj ili havis 736; da muloj ili havis 245; da kameloj ili havis 435; da azenoj 6.720.* (Bib).

[[En ordinara Esperanto tio estus *Ili havis 736 ĉevalojn, 245 mulojn, ...*]].

PAG.133.H kaj RV (en la artikolo pri *da*), tamen, koincide akceptas tiun *Da ĉevaloj ili havis 736* (= *Ili havis 736 da ĉevaloj*) kadre de la ordinara uzado de *da* [[do, analoge al *Ili havis centojn da ĉevaloj*]].

[[Nu, tian [[strangan]] uzon de *da* mi provas kompreni kiel literaturan/patosan reliefigon de parolo pri kvantoj]]. [[Alikaze, aŭ jen temas pri erara konstruo, aŭ jen ni povas analoge diri **Unu da vidvinoj havis du da filinoj** egale bone kiel *Unu vidvino havis du filinojn*]].

- *Moseo diris al ili (pri la manao): Neniu restigu iom da ĝi ĝis la mateno.* (Bib).

Laŭ PAG.133.H.2, prefere *lom el ĝi* [[ĉar "ĝi" en "*da ĝi*" estas difinita tuto]]. (Krome, la interreta Bib havas "*el ĝi*").

Sed RV sin tenas al *da*.

Pli interesa ol la ĵusa ekzemplo estas la jena (kiun mi prenas el RV):

- *Estas multe da ni kaj da niaj filoj kaj filinoj.* (Bib).

La interreta Bib same havas tiun "*da*".– (La versioj H, F, A de tiu biblia frazo diras "Ni, niaj filoj kaj filinoj, estas multaj". La G versio diras "Niaj filoj kaj filinoj estas multaj". Kaj la Lat versio diras "Niaj filoj kaj filinoj estas tro multaj").

Sed ni nun ne povas diri (imite al la antaŭa ekzemplo) **Estas multe el ni kaj el niaj filoj kaj filinoj**.

[[Nu, tian [[strangan]] uzon de *da* mi provas kompreni kiel literaturan/patosan alternativon por la frazo *Estas multe da homoj (ĉi tie), ni kune kun niaj filoj kaj filinoj*]].

.....

(5.8.14) PAG atentigas, ke oni ne diru **trinki da teo** aŭ **manĝi da pano**, sed *trinki teon*, *manĝi panon*, *trinki iom da teo*, *manĝi multe da pano*, ktp.

PIV diras, ke la mezurvorto foje estas neesprimita: *Ĉu ankore da kafo?* [[*'Ĉu ankore (vi volas pli/iom da kafo?)*]].

-- Nu, tia uzo de *da* sen determinato antaŭ ĝi ja estas lingve erara, [[sed perfekte

- *Je mange du pain = *Mi manĝas da pano**
- *Je ne mange pas de pain = *Mi ne manĝas da pano**
- *Je mange beaucoup de pain = Mi manĝas multe da pano*

komprenebla kaj relative ofta en

- [[**Ĉu da suker'?* – **Nur iom da, volu**]].

familiara konversacio]], [[kaj iel parenca al la F t.n. partitiva artikolo]].

[[Eĉ plie, mi supozas relative ofta, en familiara konversacio, anke uzon de *da* sen suplemento post ĝi (kiel en la dua parto de la lasta ekzemplo de ĉi tabelo), ĉar ĉi suka prepozicio iom invitas al ludado per ĝi]].

-- Ni revenu al jena ekzemplo (jam traktita en (2.4.1)):

- *... kiu sidis kun la alumetoj, el kiuj preske un tuta skatoleto estis forbruligita.* (Z.)

Tiu frazo estas perfekte ĝusta kaj komprenebla laŭ lingva vidpunkto.

[[Laŭ vidpunkto de logiko, tamen]], pli ĝustus diri *skatoletpleno* ol

- *... la alumetoj, el kiuj preske un tuta skatoletpleno ...*
- *... la alumetoj, da kiuj preske un tuta skatoleto ...*

skatoleto, sed tio estus ekscese logikema kaj malbela por la ordinara parolo (vidu (2.3)).

Alia alternativo (logike tamen malpli klara ol tiu ĵus traktita), estus anstatigi la prepozicion *el* per la prepozicio *da*, kaj gardante la vorton *skatoleto*. (Do, kvankam sub alia sintaksa ordo, temas pri *un tuta skatoleto da kiuj*).

[[La kombinaĵo *da kiuj*, ŝajne, ne estis tradicie uzata]], sed ĝi estas eĉ relative ofta en nuntempaj tekstoj (*da kiuj ekzistas tuta amaso*, *da kiuj ĝi povas enhavi eĉ plurajn milojn*, *plejmulto da kiuj prenis informilojn*, ktp).

[[Cetere, tiu malsama ordo ja estas tiu principe nepra ĉe rilativoj: *Jen la homo, kiu venis hiere*, kaj *Jen la homo, kun kiu mi venis hiere* (= *Jen la homo, mi venis hiere kun kiu*)]].

Rim.– [i] E ja posedas difinan artikolon *la*, kaj anke duondifinan artikolon pere de la komplekso *unu/certa*.– [[Nu, ni ĵus vidis spontanen ektuŝon al la F partitiva artikolo en la familiara parolo pere de la prepozicio *da*]].– Do, nur la nedifina artikolo daŭre restas fremda al E. •

[[ii]] [[Mi preterpase citu la fakton (ne registritan en PAG nek PIV), ke apud tradiciaj frazoj kiel en la una ĉi-apuda ĉelo (en kiu la duondifina *certa* ja estas adjektivo), en la Interreto troviĝas anke frazoj en kiuj tiu vorto ludas rolon pronoman, kiel en ĉi dua ĉelo]].

[[Tia novaĵo ja paŭsas la F konstruojn *Certains de leurs leaders historiques* (aŭ *d'entre leurs*), *Certains disent que...*, *Certains sont beaux*]].

- | |
|--|
| <ul style="list-style-type: none"> • <i>Certa</i> sinjoro Frank • <i>En certaj</i> okazoj oni devas esti tre singardaj |
| <ul style="list-style-type: none"> • <i>Certaj</i> el iliaj historiaj gvidantoj • <i>Certaj</i> diras ke... • <i>Certaj</i> estas belaj |

(6) La formulo de Stojan (laŭ Vikipedio).

<ul style="list-style-type: none"> • -o <i>de</i>/[[<i>el</i>]] X estas -o <p>[[estas -o laŭ la speco X]]</p>	<ul style="list-style-type: none"> • -o <i>da</i> X estas X <p>[[estas X laŭ la kvanto -o]]</p>
--	--

Rim.– [i] [[Mi aldonas tiujn enkrampaĵojn por proksimuma klarigo pri la pli-malpli elasta signifo de la formulo]]. [[Ja nenia kurta klarigo povus perfekte taŭgi por la senfineco da nuancoj doniĝantaj en la lingvo]]. •

[[ii]] Ĉi formulo ne estas citita en PAG, PIV kvankam [[fakte, ĝi estas plene inkludita en ĝia pli ĝenerala kadro pri *de/da* laŭ (5.8)]].– [[Ĝi aperas en RV, kvankam kun modifeto, kaj ne menciante ĝian nomon, vidu (8.6)]]]. •

-- Ekzemploj:

<ul style="list-style-type: none"> • <i>Ŝi faris bukedon el floroj</i> [¹] • <i>Ŝi portis bukedon el/de floroj</i> [²] <p>(Temas pri ia bukedo: <i>Bukedo konsistanta el floroj = Flora bukedo = Floroj-bukedo = Florbukedo</i>)</p> <ul style="list-style-type: none"> • [[<i>Tri funtoj de tiu pano</i>]] (Temas pri iaj tri funtoj). 	<ul style="list-style-type: none"> • <i>Deko da floroj = Dek floroj</i> • <i>Aro da floroj = Floraro</i> • <i>Bukedo da floroj</i> [³] <p>(Temas pri <i>Deko da iaj floroj</i>). (En la tria ekzemplo: <i>Floroj konsistigantaj bukedon = *Bukeda floraro*</i>)</p>
<ul style="list-style-type: none"> • <i>Floroj el bukedo</i> • <i>Floroj de bukedo</i> <p>(Temas pri iaj floroj)</p>	----

[¹] Laŭ la ekzemplo ... *ili ne ĉiam estas faritaj el tolo* (EKZ).

[²] Kiel en *Vi metis sur lian kapon kronon el pura oro.* (Bib).– *Muroj de miljaroj.* (Z.).– *Bukedoj de freŝaj floroj.* (Fa).

[³] Laŭ la ekzemplo *Bukedo da violoj.* (Z.)

Rim.– [i] [[Ĉi formulo estas principe aplikata al la kazoj, en kiuj la prepozicioj *de, el* enkondukas suplementon de konsisto, materialo, k.s., kaj ne suplementon de posedo (kiel en "*bukedo de Petro*"), aparteno, k.a.]].

[[Temas pri kazoj en kiuj tre klaras kaj simplas alternativoj adjektiva ("*flora bukedo*") aŭ kunmeta ("*florbukedo*") al prepoziciaĵo ("*bukedo de/el floroj*")]].•

[ii] Laŭ PAG.134.H, la prepoziciaĵoj kun *da* ne povas esti alternative esprimataj adjektive aŭ kunmete.•

.....

(6.1) Pliaj ekzemploj:

<ul style="list-style-type: none"> • <i>Glaso de vino</i> estas <i>glaso</i> (= <i>glaso por vino, vinglaso</i>) • <i>Skatolo de bombonoj</i> estas <i>skatolo</i> (= <i>skatolo por bombonoj, bombonskatolo</i>) 	<ul style="list-style-type: none"> • <i>Glaso da vino</i> estas <i>vino</i> (= <i>vino laŭ ia kvanto</i>) [[*]] • <i>Skatolo da bombonoj</i> estas <i>bombonoj</i> (= <i>bombonoj laŭ ia kvanto</i>) [[*]]
---	--

[^{*}] La formulo de Stojan principe liveras, do, la signifojn *glaspleno da vino* (= la entenata vino), *skatolpleno da bombonoj* (= la entenataj bombonoj) laŭ la larĝa rolo de *da*.

La eventualaj signifoj *glaso + glaspleno*, *skatolo + skatolpleno* (laŭ la kompleksa rolo de *da*) estas flanka afero, kies manipulado daŭre estas lasata al la kontrasto *aĉeti / trinki*, k.s. (Vidu (2.4.1)).

-- Diference, laŭ la modifeto farita en RV pri la formulo de Stojan, jen la principa signifo de *glaso da vino* estas *glaso + glaspleno da vino*. (Vidu (8.6)).

Laŭ PIV: <i>komitato: Grupo de personoj, elektita</i> en ...	Laŭ RV: <i>komitato: Grupo da personoj, elektitaj</i> por
--	---

(Komenton pri ĉi du difinoj pri *komitato* vidu en (3.2)).

<ul style="list-style-type: none"> • <i>Taĉmento de soldatoj.</i> (Fa) (Taĉmento konsistanta el soldatoj). (Oni povus diri anke <i>Taĉmento el soldatoj</i>) 	<ul style="list-style-type: none"> • <i>Taĉmento da tamburistoj.</i> (Z.) (Tamburistoj formantaj taĉmenton)
<ul style="list-style-type: none"> • <i>Granda reto de/el komputiloj</i> (= <i>granda komputil-reto</i>). (Reto konsistanta el komputiloj). 	<ul style="list-style-type: none"> • <i>Granda reto da komputiloj.</i> (Komputiloj aranĝitaj en reto, komputiloj konsistigantaj reton)

Rim.– [[Ĉu vere necesas (aŭ eĉ utilas) ĉiupaŝe kaj sisteme eksplice distingi tiajn nuancetojn?]].– [[Ĉar ja estus surprize ke, ĉe efektiva bezono distingi, jen kunteksto kaj situacio ne sufiĉus por tio]].•

<ul style="list-style-type: none"> • <i>Aro de/el kondiĉoj.</i> (Aro konsistanta el kondiĉoj). 	<ul style="list-style-type: none"> • <i>Aro da kondiĉoj</i> (= kondiĉaro). (Kondiĉoj konsistigantaj aron).
---	---

<ul style="list-style-type: none"> • La kondiĉaro de tiu ĉi kontrakto. • La aro da kondiĉoj de tiu ĉi kontrakto. • La aro ĉda? / ĉde/el? la kondiĉoj de tiu ĉi kontrakto. (Difinita / nedifinita tuto) 	
<ul style="list-style-type: none"> • Matene estis tavolo de/el roso ĉirkaŭ la tendaro. [[ia tavolo]] • Ĉu ŝtipon de/el ligno mi adoros?. [[ia ŝtipo]] 	<ul style="list-style-type: none"> • Matene estis tavolo da roso ĉirkaŭ la tendaro. (Bib) [[roso laŭ ia kvanto/aranĝo]] • Ĉu ŝtipon da ligno mi adoros?. (Bib) [[ligno laŭ ia kvanto/formo]]

<ul style="list-style-type: none"> • Serĉi aliajn fontojn de enspezoj. (Z.) (= Serĉi aliajn enspezo(j)-fontojn). 	<ul style="list-style-type: none"> • Fonto de akvo, akvofonto. • Puto de petrolo, petrolputo.
<ul style="list-style-type: none"> • Ho, se mia kapo havus sufiĉe da akvo kaj miaj okuloj estus fonto da larmoj!. (Bib) [En RV] • Ho, se miaj okuloj estus fonto de larmoj!. (BibX) [En PIV] • Ho, se mia kapo havus sufiĉe da akvo kaj miaj okuloj estus fonto de larmoj!. (Mi supozas, BibX) 	
<ul style="list-style-type: none"> • Jen mi staras apud la fonto da akvo, kaj la filinoj de la urbanoj eliras, por ĉerpi akvon. (Bib) ĉ Fonto de akvo (BibX)? 	

-- Laŭ RV (en la artikolo pri "**da**"), tiu "okuloj... fonto **da** larmoj" signifas "larmoplenaj okuloj", "la kuno de la okula ujo kune kun ilia larva enhavo" (t.e., "okuloj + okulplenoj **da** larmoj").

[[Tamen, mi pensas (kaj tio des pli pravigas la ŝanĝon de "fonto **da**" (Bib) al "fonto **de**" (BibX)) ke, en ĉi frazo, ujo estas ne la okuloj, sed la kapo, krome havanta sufiĉe **da** akvo (t.e., "kapo + kapopleno **da** akvo"), kaj ke tia sufiĉo elfluas eksteren tra la okula fonto]].

.....

(6.2) Ekzemploj pri kolizietoj.

<ul style="list-style-type: none"> • klubano = ano de klubo • ŝafido = ido de ŝafo • ŝafino = ino de ŝafo 	<ul style="list-style-type: none"> • ŝafaro = aro da ŝafoj • homaro = aro da homoj / ĉiuj homoj en la mondo • panero = ero da/de/el pano
<ul style="list-style-type: none"> • peco de pano estas ia peco (Stojan) • peco da pano estas pano (Stojan) • panpeco estas ia peco (ĉar la ĉefa vorto staras en la fino) 	<ul style="list-style-type: none"> • Do, ni venus al panpeco = peco de/el pano. • Sed la fakta uzo estas panpeco = peco da pano.

<ul style="list-style-type: none"> • La <u>eldonkvanto</u> estos 500 ekzempleroj. La kvanto de la eldono estos... . • Laŭ la kvanto de manĝado de ĉiu, ili kalkulu. (BiN).- Laŭ la <u>manĝadokvanto</u>... • La kvanto de ĉiu stipendio estos ĝis 500 eŭroj.- Ĉiu <u>stipendiokvanto</u> estos... • Horo estas unito (por mezurado) de tempo/daŭro.– Horo estas temp-unito. • En la kvanto de 135 mil litroj en minuto. (Z.) 	<ul style="list-style-type: none"> • Horo estas parto/[da] tempo.– Horo estas <u>tempokvanto</u>. • La <u>tempokvanto</u> dediĉata al ripozo. • La tuta <u>akvokvanto</u> sur la Tero. • La <u>monkvanto</u> en mia poŝo. • La <u>grenkvanto</u> rikoltita ĉi-jare. • Dum sia tuta historio la <u>homkvanto</u> restis tre malgranda. • La kvanto de [da] E-parolantoj multiĝos. (Vik)
--	--

[[La principa signifo de kunmetitaj vortoj finiĝantaj per "... kvanto" estas "kvanto **de**" (vidu (5.1))].- Tamen (kaj parente al la ĵus traktita *panpeco* = *peco da pano*), en la Interreto oftas anke ekzemploj kun la signifo "kvanto **da**" (kiel en la dua ĵusa ĉelo).

<ul style="list-style-type: none"> • mil jaroj • 1000 jaroj • milo da jaroj (Lat. <i>mill.ennium</i>) • milopo da jaroj • kilojaro (en geologio k.a.) 	<ul style="list-style-type: none"> • <i>miljaro</i> [arkaismo] (<i>mil.jaro</i>) = mil jaroj -- (Analoge al <i>tri.monato</i> [arkaismo] kaj al <i>kilo.jaro</i>) -- (Ne temas pri <i>jaro de milo</i> aŭ <i>jaro el milo</i>)
	<ul style="list-style-type: none"> • <i>jarmilo</i> (<i>jar.milo</i>) = milo da jaroj. -- (Analoge al G <i>Jahr.tausend</i>, parente al <i>tempo.kvanto</i>) -- (Ne temas pri <i>milo de jaroj</i> aŭ <i>milo el jaroj</i>)

(7) Pri **de** kaj **da** en PMEG.

[[Ĝi rigore, koncize kaj pedagogie laŭas la enhavon de PAG]].

(8) Pri **de** kaj **da** laŭ RV:

Rim.– Mi ja ne prenas ĉiujn ekzemplojn el RV, sed nur kelkajn el ĉiu fako. •

Ni komencas legante la RV-artikolon pri **da**. (Pri la artikolo pri **de**, vidu (10)):

-- RV distingas du bazajn kazojn (numeritajn (1) kaj (2)) pri la signifo/rolo de **da**, kun po du subkazoj [(1.a), (1.b), (2.a), (2.b)]."

(1) La prepozicio **da** esprimas kunon de fizika aŭ metafora ujo kaj ĝia enhavo:

(8.1) (1.a) Fizika ujo kaj substanca enhavo:

- *Glaso da vino estas glaso plena je vino.* (EKZ.32) [*]
- *Sur la tablo staris botelo da vino, kuŝis skatolo da bombonoj* (t.e. staris **botelo** plena **je** vino, kuŝis **skatolo** plena **je** bombonoj). (Int).
- *Ho, se mia kapo havus suface da akvo kaj miaj okuloj estus fonto da larmoj!*. (Bib).– [Vidu (6.1)]
- [[*Mi mendis tri glasojn da bordoza ruĝa vino en la kafejo*]].
- [[*Mi aĉetis un skatolon da tre bongustaj bombonoj en la butikoj*]].
- [[*Da post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro*]]. (EKZ.32) [*]
- [[*Trinki glason da teo*]]. (Z.)

[*] [[Ambaj preskriboj troviĝas en la sama EKZ.32.– Vidu en (2.4) pri la logika kontraŭdiro inter ili, kaj pri la lingva solvo de tiu kontraŭdiro]].

-- Kontraste al *kun* [[kiel en *Botelo kun vino = Botelo kun pli-malpli da vino*]], *da* implicas normale plenan ujon.

Rim.– [i] [[Laŭ la vidpunkto de tio traktita en (2.4), jen tiu ĉi sekcio (1.a) temas pri la kompleksa rolo de *da* (*Botelo da vino = Botelo + Botelpleno da vino*)]].•

[ii] [[Mi aldonas la du lastajn ekzemplojn de la una ĉelo kaj tiujn de la dua ĉelo prepare al temo traktota en (8.7). (Kaj analoge en la tabeloj ĉi-sekvaj)].•

.....

(8.2) (1.b) Kuno de strukturo, formo kaj ĝia materio, io arigita:

- *Antaŭ nia militistaro staris granda serio da pafilegoj.* (EKZ).
- *Sistemo da sonoj por la esprimado de pensoj.* (Z.)
- *Matene estis tavolo da roso ĉirkaŭ la tendaro.* (Bib)
- *Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, precipe aroj da bellanaj ŝafoj.* (EKZ)
- [[*La serio ĉi da?/ĉi de? ŝiaj sukcesoj estas tre granda*]].
- [[*La serio ĉi da?/ĉi de? la naturaj nombroj estas 1, 2, 3, ..., n,*]].
- [[*Bukedo de/el rozoj (= rozbukedo) estas bukedo konsistanta el rozoj*]]. (Stojan)
- [[*Bukedo da rozoj estas rozoj aranĝitaj en bukedo*]]. (Stojan).

-- Ĉi tiujn sencojn (1.a) kaj (1.b) de la prepozicio *da*, logike la kerna(j)n, PV kaj ambaj PIV-oj ne konas". [[Vidu (5.8.6)].

Rim.– [i] [[Estus bonvena ia argumento aŭ klarigo pri la kialo aŭ principo laŭ kiu la plej kompleksa [[kaj tiu malplej ofte uzata]] senco de *da* (nome, tiu en (1.a)), estas tamen kerna senco laŭ vidpunkto de logiko, kaj de kiu deriviĝos pli simplaj sencoj. Kaj analoge pri la frazoj en (1.b)].•

[ii] [[Kadre de la malvolvo farita en niaj unaj paĝoj surbaze de UV kaj EKZ, jen en ĉi sekcio (1.b) ni havas aferon al la baza rolo de *da* (nome, laŭ UV, "*La E prepozicio da estas uzata post vortoj esprimantaj mezuron, nombron, [[kvanton]]*")].– [[Fakte, temas pri ekzemploj de nepreciza mezuro, do la tria frazotipo kadre de la baza rolo de *da*]].

[iii] [[Kadre de tiu ĵus dirita malvolvo, la prepozicio *da* rilatas nur al mezuro k.s., tiel ke ĉia eventuala nuanco pri havado aŭ manko de strukturo en frazoj en kiuj antaŭ *da* rolas vortoj kiel *aro, amaso, grupo, serio, sistemo, reto, labirinto, taĉmento, svarmo, fonto, maro, lavango*, ktp., ja estas afero rilata nur al la signifo propra de ĉi vortoj, sed ĝi estas absolute fremda al la rolo de *da*]].– [[Tute analoge al tio ĉi, jen ĉia eventuala nuanco pri ujo en (1.a) estas afero absolute fremda al *da*, kaj dependas nur de la vorto antaŭ *da*]].•

.....

(2) La prepozicio *da* rilatigas kun iliaj komplementoj vortojn esprimantajn precizan au neprecizan kvanton, nombron, mezuron, pezon.

Rim.– [[Jen nun aperas la UV-preskribo pri la baza rolo de *da* : La E prepozicio *da* estas uzata post vortoj esprimantaj mezuron, nombron, [[kvanton]], kiel anke *Da* post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro. (EKZ.32) .– [[Laŭ la vidpunkto de niaj unaj paĝoj, jen ĝi malfrue aperas, ĉar ĝi devus aperi jam en (1.b)]]•

(8.3) (2.a) La vorto antaŭ *da* estas mezurvorto:

- | | |
|--|----------------------|
| • <i>Un kilogramo da teo.</i> | [[Preciza mezuro]] |
| • <i>Dek du jaroj da laborado.</i> | [[Preciza mezuro]] |
| • <i>Plenmanoj/[[manpleno]] da cindro.</i> | [[Nepreciza mezuro]] |
| • <i>[[Mi aĉetis iom da pano kaj multe da bombonoj]].</i> | [[Nepreciza mezuro]] |
| • <i>[[Un kilogramo ĉ da?/ĉ de/el? tiu ĉi teo]]</i> | |
| • <i>[[Un kilogramo ĉ da?/ĉ de/el? la teo kiun mi aĉetis hiero]]</i> | |

Rim.– [[Kadre de la baza rolo de *da* laŭ (2.2), jen la du unaj ĉi-supraj ekzemploj apartenas al la tiea una frazo-tipo (t.e., la tipo de preciza mezuro pere de mezur-unitoj), kaj ili tial ja propre apartenas al ĉi sekcio (2.a)]].

[[Sed la tria ekzemplo (kiel anke la aldonita kvara ekzemplo) apartenas al la tiea tria frazo-tipo (la tipo de nepreciza mezuro), kaj ili tial kadre de la baza rolo de *da* apartenas al la ĉi-supra sekcio (1.b)]]•

.....

(8.4) (2.b) La vorto antaŭ *da* estas nombrovorto:

- | | |
|--|----------------------|
| • <i>Mi aĉetis dekduon da kuleroj kaj du dekduojn da forkoj.</i> (EKZ) | [[nombrovorto]] |
| • <i>En duono da minuto ĉio estos en ordo, sinjoro!.</i> (Z.) | [[nombrovorto]] |
| [Laŭ PAG/PIV, "duono de minuto", vidu (5.8.8)] | |
| • <i>Multe da papero, pli da akvo.</i> | [[nepreciza mezuro]] |
| • <i>Estas multe da ni kaj da niaj filoj kaj filinoj.</i> (Bib). | [[nepreciza mezuro]] |
| (Vidu (5.8.13)). | |
| • <i>... po un dekonon da delikata faruno.</i> (Bib) [*] | |
| • <i>[[Mi ŝtelis dekduon ĉ da?/ĉ de/el? viaj kuleroj]].</i> | |
| • <i>[[Mi ŝtelis dekduon ĉ da?/ĉ de/el? la kuleroj de via kolekto]].</i> | |

Rim.– [[Daŭre kadre de niaj unaj paĝoj, jen la du unaj ĉi-supraj ekzemploj apartenas al la tiea dua frazo-tipo (t.e., la tipo kun nombrovortoj), kaj ili tial ja propre apartenas al ĉi sekcio (2.b).– Sed la tria kaj kvara ekzemploj apartenas al la tiea tria frazo-tipo (la tipo de nepreciza mezuro), kaj ili tial propre apartenas al la ĉi-supra sekcio (1.b)]]•

[*] [[Ĉi tiu frazo estas per si mem sensenca]].– Nu, ĝi aperas en jena sinsekvo da esprimoj en Bib: *dekonon de efo da delikata faruno kiel farunoferon, du dekonojn de efo da delikata*

faruno kiel farunoferon, tri dekonojn **de** efo da delikata faruno kiel farunoferon, du dekonojn **da** delikata faruno kiel farunoferon, po unu dekonon **da** delikata faruno kiel farunoferon.

-- Nu, klaras, ke en la du lastaj frazoj temas pri kurtigo de du dekonojn **de** efo **da**..., unu dekonon **de** efo **da**...

-- 🗨️ [[Ne parolante nun pri (ne)akceptindeco de iuj aŭ aliaj normoj, jen ni havas ke, en ĉi kazo, RV intence false citas, elektante kurtigitan, per si mem sensencan frazon, kaj silentante pri la apude abundaj plenaj frazoj]].

-- Cetere, en la artikolo pri "efo" (do, ne en la artikolo pri **da**), jen RV fidele kaj ne misgvide citas: [oferu] dekonon **de** efo **da** delikata faruno. (Bib).

.....

(8.5) [[La ĵusaj tabeloj (1.a), (1.b), (2.a) kaj (2.b) konsistigas la kernon de la RV-traktado pri **da**, tiel ke ĉiuj ceteraj aferoj estas traktataj en komplementaj normoj kaj en pluraj rimarkoj (iuj el ili eĉ kompleksaj)]].

[[Nu, kiel ni ĵus vidis, tiuj kvar diritaj tabeloj traktas (kvankam sub alia gramatika konceptado kaj ordo), tion kiun en niaj unaj paĝoj ni nomas la kompleksan rolon de **da**, kaj la tri grupojn konsistigantajn la bazan rolon de **da**]].

[[Tiuj kvar tabeloj ne traktas, do, pri tio kiun en la unaj paĝoj ni nomas "la larĝa rolo de **da**", kaj ĝi tial estas traktata en la komplementa parto. (Vidu (8.7))]].

.....

(8.6) Inter la tabeloj (1.b) kaj (2.a) RV prezentas la formulon de Stojan (vidu (6)), tamen kun modifeto, kaj ne menciante tiun nomon.

Jen la RV-redakto:

-- Principe, "A de B" estas "A (iel rilata al B)"...	kaj "A da B" estas aŭ "A kun B", aŭ "B en la mezuro indikita per A".
---	--

Ekzemploj:

• Skatolo de bombonoj [[=bombonskatolo]]	estas nur la skatolo. [*]
• Skatolo da bombonoj	estas kaj la skatolo kaj la bombonoj. [**]
• [[Glaso de vino (= vinglaso)	estas nur la glaso]]. [*]
• [[Glaso da vino	estas kaj la glaso kaj la vino]]. [**] [***]

[*] [[Tio ĉi ja koincidas kun EKZ.32 en (2), kaj kun la formulo de Stojan propra]].

[]** [[Tio ĉi ja estas reveno al la sekcio (1.a)].– [[Kaj tio estas modifeto de Stojan propra, ĉar en tiu ĉi la prepozicio **da** principe ludas sian larĝan rolon, t.e., "nur la skatolpleno, nur la entenataj bombonoj", "nur la glaspleno, nur la entenata vino"]].

[*]** Sekve, se en la frazo ne estas parolo pri ujoj, jen doniĝas koincido inter tiu ĉi RV-preskribo kaj Stojan propra. •

.....

(8.6.1) Jen pliaj ekzemploj el RV, sen parolo pri ujoj:

- *Li verkis grandan nombron **da** artikoloj.*
- *La nombro **de** liaj artikoloj estas tre granda*
- *[[La nombro **de** artikoloj pri la cunamo estas tre granda]].*

- [[En la una ekzemplo temas pri artikoloj (Stojan)]. [[Li verkis artikolojn, kun aldona informo, ke en granda nombro]].
- [[En la dua kaj tria ekzemploj temas pri nombro (Stojan), kun aldonaj informoj, ke la nombro estas tre granda, kaj pri la aŭtoro aŭ pri la artikoltemo]]. [*]

[*] [[Laŭ vidpunkto de la ĝenerala traktado en PAG/PIV (kio inkludas la formulon de Stojan, kvankam ĝin ne citante), jen la decida afero pri uzado de **da** aŭ **de** ja estas, ke en la una ekzemplo la suplemento "artikoloj" estas nedefinita tuto, kaj ke en la dua kaj tria ekzemploj la suplementoj "liaj artikoloj" kaj "artikoloj pri la cunamo" ja estas difinitaj tutoj]]. (Vidu (5.8)).

Rim.– [[Vikipedio havas paĝon kun titolo "Nombro **da** elstaraj artikoloj", kaj un leganto opinias, ke la titolo devus esti "Nombro **de** la elstaraj artikoloj", sed por pravigi tian aserton li uzas propran argumenton, alian ol tiu decida laŭ PAG [[nome, ke la suplemento en tiu frazo, "elstaraj artikoloj (publikigitaj en Vikipedio)", ja estas perfekte difinita tuto]].•

.....

(8.6.2) Kaj jen bela paro da kontrastaj ekzemploj el RV (koincidaj kun Stojan, ĉar en ili oni ne parolas pri ujoj):

- *Ombro **de** granda dubo malserenigis lian vizaĝon.*
[[Temas pri ombro laŭ ia speco (Stojan)]. [[Ombro kaŭzita/venanta de dubo]]
- *Ni povas tion ĉi antaŭvidi ... sen ia ombro **da** dubo. (Z.)*
[[Temas pri dubo laŭ ia grado (Stojan)]. [[Malforta dubo, ekdubo]].

.....

(8.6.3) Kaj la lasta ekzemplo de ĉi sekcio de RV:

Z. klarigis, ke "*kvaronjaro* (=mezuro) estas parto **da** tempo, sed *printempo* (=speciale montrita parto) estas parto **de** jaro" (16)

Nu, jen duafoje RV false citas, ĉar la vera LR-teksto estas:

«kva-
ronjaro» (= mezuro) estas parto **da** jaro, sed «printempo» (=
speciale montrita parto) estas parto **de** jaro.

Tamen, tia miscito enfermas jenajn du pravajn asertojn (eksplica la una el ili, implica la dua):

(a) *Kvaronjaro, jaro, minuto*, ktp estas partoj/[kvantoj] *da* tempo. (Vidu (4.2.4)).

(b) Malgraŭ la klarigo de Z., jen *kvaronjaro* estas parto *de* jaro, do ne parto *da* jaro. (Vidu (4.2.5)). (Vidu (8.9)(b)).

.....

(8.7) Ni venas al tiu **Rim.** en kiu RV enkondukas la ĝis nun mankantan "larĝan rolon de *da*" (vidu (8.5)).

-- Nu, ĉar mi ne sukcesas kompreni tion tie diritan, jen mi ĝin simple kopias tie ĉi, metante klare apartaj ĝiajn partojn:

[a] Fakte, la uzo de <i>da</i> en la kazo (2) ...	[[<i>Un kilogramo da teo, Un dekduo da kuleroj</i>]]
[b] ... estas metonimia uzo de <i>da</i> en la kazo (1.b) ...	[[<i>Serio da pafilegoj</i>]] [[<i>ĉi(1.a), Glaso da akvo, Skatolo da bombonoj?</i>]]
[c] ... en kiu la rolon de ujo ...	
[d] ... havas esprimo mezura aŭ kvanta ...	[[<i>kilogramo, dekduo</i>]]
[e]... kaj kiu prezentas ne la kunon de la enhavo kaj ujo, ...	[[<i>teo+kilo, kuleroj+dekduo</i>]]
[f] ... sed [[nur]] la enhavon".	[[<i>teo, kuleroj</i>]]
[g] <i>Li trinkis glason da akvo</i> signifas, ke li trinkis la akvon, ne la glason. [*]	
[h] [[<i>Li manĝis skatolon da bombonoj</i> signifas, ke li manĝis la bombonojn, ne la skatolon]] [*]	

[*] [[Laŭ la signifo de *Glaso da akvo* kaj *Skatolo da bombonoj* en (1.a), kaj se harfendi, jen la ĝustaj esprimoj estus "... li trinkis la akvon, ne káj la glason káj la akvon", "... li manĝis la bombonojn, ne káj la skatolon káj la bombonojn"]].

Rim.– [i] [[Kvankam –kiel supre dirite– mi ne sukcesas kompreni, 'kiel el tia [[malklara]] gramatikumado oni povas veni al pravigo de tiu [g], nu, ni akceptu ke, efektive, tia aserto estas pravigita]].•

[ii] [[Laŭ tio, jen RV enkondukas la ĝis nun mankantan "larĝan rolon de *da*"]].

[[Kaj, kvankam pri tio nenio estas eksplice dirita en RV, ja implice klaras, ke la distingado inter la kompleksa kaj la larĝa rolo de *da* okazas per la kontrasta uzado de *fabriki / vendi / aĉeti / mendi*, ... por la kompleksa rolo, kaj *konsumi / trinki / manĝi* / ... por la larĝa rolo. (Kaj ja, ĉe bezono, per pli detala kunteksta informo). (Vidu (2.4.1))]].•

.....

(8.8) [[La diferencoj inter tio ĝis nun traktita el la RV-artikolo pri *da*, kaj la koncernaj partoj laŭ la tradicia malvolvo, estas diferencoj *nur-gramatikistaj*, kiuj, tial ne modifas la parolon nek ties signifon]].

[[Sed en tio kiu nun sekvas ja doniĝas diferencoj en la parolo]].

[[Laŭ mia kompreno, en la sekvaĵo ni konstatos, ke tiujn diferencojn oni povas resumi jene]]:

☛ [[Laŭ reguloj baziĝantaj sur propraj, kvaze aksiome starigitaj principoj, jen por RV estas vana la distingado farita kaj malvolvita de LR.16 kaj PAG/PIV inter "suplemento esprimanta *nedifinitan tuton*" kaj "suplemento esprimanta *difinitan tuton*" (kun respektivaj uzadoj de *da* kaj *de* (vidu (5.8)), ĉar en ĉiuj kazoj tie traktitaj oni sisteme kaj uniforme uzu la prepozicion *da* (kiel en *da mia*, *da tiu*, *duono da*, ktp).– Nur *da la* estas [[tolerata]] ĉar tio fariĝis tradicio en E]]. (Vidu (11.1)).

-- [[En la sekvaĵo temas pri la diversaj **Rim.** en kiuj RV malvolvas pri tiaj diferencoj]].

(8.9) Plu laŭ RV: PV kaj ambaj PIV-oj ial tabuas [[!]] la uzon de *da*:

(a) Antaŭ la mezurvortoj: *60 markoj da rekompenco*, *mil frankoj da rento* ..." [PV]

Rim.– [i] [[ĉi Antaŭ aŭ post la mezurvortoj?]].– [[El tio ĉi mi komprenas, ke RV diras, ke PV malrekomendas/ malpermesas la esprimon "*Mil frankoj da rento*" k.s.]].

Nu, mi ne posedas tiun malnovan vortaron, sed PAG.133.H prezentas la kontrastan paron *Rento de 600 frankoj – 600 frankoj da rento*, kaj PIV prezentas la paron *Rento de mil dolaroj – Mil dolaroj da rento*. (Vidu (5.8.7)).•

(b) La substantivoj, kiuj venas post *da*, ne povas mem esprimi precizan kvanton. [PIV2]

Tamen kontraŭekzemplojn oni abunde trovas ĉe Zamenhof kaj aliaj bonaj aŭtoroj:

- *Kaj en la flankaj ĉambretoj li mezuris unu stangon da longo kaj unu stangon da larĝo.* (Bib).
- "*Kvaronjaro*" (= mezuro) estas parto *da jaro*, sed "*printempo*" (= speciale montrita parto) estas parto *de jaro*. (LR.16).– (Vidu (8.6.3)).
- *muro ... duonon da metro larĝa.* (Fa)".

[ii] [[Ne tuŝante tie ĉi la temon, ĉu tia preskribo de PIV2 estas akceptinda aŭ ne, jen ni simple konstatu, ke ĝi estas kurta resumo (redaktita per nea propozicio) de la detala traktado en PAG (redaktita per jesa propozicio), ke *da* enkondukas suplementon kun signifo pri nedifinita tuto. (Vidu (5.8))]].•

[iii] [[Nu, la aserto, ke kontraŭekzemploj abundas, fakte signifas ke anke ekzemploj abundas: Efektive, tiel ĉe Zamenhof kiel ĉe aliaj bonaj aŭtoroj abundas preske en pelmelo ekzemplojn kun nekohera uzado de la prepozicioj *de* kaj *da* (vidu (3))]].

[[Tamen, ne tiu informo pri tia malsekreta fakto estas la grava afero: Kio tie ĉi gravas estas, ke se oni akceptas la pelmelon, se oni ne prezentas argumentojn por preferindeco de unu aŭ aliu alternativo laŭ la diversaj kazoj, jen konkludo trudiĝas, ☛ ke un el la du prepozicioj *de* kaj *da* estas superflua kaj nur ĝena por la lingvo]].•

[iv] [[La una el tiuj kontraŭekzemploj fakte estas gapiga kontraŭ-kontraŭekzemplo]]:

- Laŭ formala vidpunkto: Evidente, tiuj *longo* kaj *larĝo* (ja venantaj post *da*) estas nedifinitaj tutoj, tiel ke oni ne komprenas, 'kiel aŭ 'kial ili povus esprimi ajnan precizan kvanton. (Krome: Kio en tiu ekzemplo esprimas precizan kvanton ja estas tiu "unu stangon" venanta **antaŭ da**).
- Por trovi tiajn "kontraŭekzemplojn" oni ne bezonas serĉi tra la biblio, ĉar jen en EKZ ni havas *Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo*.•

[v] Male al tio farita pri la sama ekzemplo en (8.6.3), jen RV nun citas ekzakte el LR.16, ke Z. diras, ke kvaronjaro (=mezuro) estas parto *da* jaro.– Nu, ja bonus, se oni klarigus, 'kial en tiu frazo la vorto "kvaronjaro" estas efektive ia mezuro de io ajn. (Vidu (4.2.5)).

[vi] Apud tiu "duonon da metro" (Fa), oni ja povus, efektive, pelmele meti "kvarono *da* horo" (DL), kaj ties oponanton "365-ono aŭ 366-ono de jaro" (EKZ).

☛ [vii] [[Ĉar en la dua ĉi-supra ekzemplo jen RV finfine citetas el LR.16, ja oportunos, ke ĝi publikigus sian propran plenan detalan analizon pri la tuta LR (vidu (4.2)), anstat simple selekti el ĝi ereton taŭgan por kontribui al la pelmelo]].•

.....

(8.10) Jen ni venas al dua alineo de RV kiun mi ne sukcesas kompreni kaj kiun, tial, mi simple kopias tie ĉi, metante klare apartaj ĝiajn partojn:

[a] Revene al (2.a) (pri esprimoj en kiuj "La vorto antaŭ <i>da</i> estas mezurvorto"): <i>Un kilogramo da teo, Dek du jaroj da laborado, Plenmanoj da cindro.</i>
[b] La nomo kiun la prepozicio <i>da</i> enkondukas en tiaj esprimoj [[<i>teo, laborado, cindro</i>]] plej ofte estas nedefinite determinita (en sia una apero). [[Laŭ la terminologio de PAG/PIV, tiuj <i>teo, laborado, cindro</i> estas nedefinitaj tutoj]].
[c] En <i>Li aĉetis du metrojn da ŝtofo</i> ne estas indikite, ' kiujn du metrojn oni aĉetis, la logika akcento estas sur la kiomo .
[d] Tamen, ĝi ja estas difinita en <i>La du metroj da ŝtofo kiujn li aĉetis hiero</i> . [[<i>(La du metroj da ŝtofo) (kiujn li aĉetis hiero)</i>]]. (Vidu (4.3.3))
[e] [[<i>(Du metroj) del/el (la ŝtofo kiun li aĉetis hiero)</i>]]. (Vidu (4.3.3))

-- [[Jen miaj komentoj pri ĉio ĉi]]:

[b*] Tiu enkrampa "(en sia una apero)" estas kaj restas neklarigita afero.

[c*] Ĉar laŭ [b] ni havas aferon al la nomo kiun *da* enkondukas, kiel anke pri ties ofta nedefiniteco, jen en [c] oni devus klarigi, 'ĉu tiu *ŝtofo* estas nedefinite aŭ difinite determinita. Sed oni parolas pri tiuj *du metroj* (kio estas afero fremda al nia nuna temo).

[d*] Sed en [d] oni asertas ke, tamen, *ĝi* (= la *ŝtofo*) estas difinita (kio implicas, ke oni diras, ke en tiu [[stranga]] [c] oni asertis aŭ pruvis [[?]], ke temas pri nedifinita *ŝtofo*).

Sed en [d] jen tiu *ŝtofo* (t.e., la suplemento enkondukita de *da*) tute ne estas difinita, sed nedifinita.– (Kion oni povas tie konsideri difinita estas *La du metroj da ŝtofo*, sed tio ŝuldiĝas al la almetaĵo *kiujn li aĉetis hiero* –sed tio estas afero tute alia ol suplemento post *da*).

Se oni volas pri frazoj kun parolo pri difinita *ŝtofo* oni sin turnu al frazoj kiel tiu de mi aldonita en [e].

-- Jen ĉi-apude pliaj ekzemploj en kiuj temas pri nedifinita *ŝtofo* kaj pri difinitaj *du metroj da ŝtofo*.

- *Ŝtofo*.– *Du metroj da ŝtofo*.– *Li hiero aĉetis du metrojn da ŝtofo*.
- *(La du metroj da ŝtofo) (kiujn li aĉetis hiero)*.
- [*(La du metroj da ŝtofo) (kiujn li aĉetis hiero)*] (*montriĝis nesufiĉaj*).
- [*(La du metroj da ŝtofo) (kiuj tiom belas)*] (*veturos Berlinon*).

-- Cetere, la plena propozicio *Li aĉetis du metrojn da ŝtofo* kaj la nura sintagmo ne-propozicio *La du metroj da ŝtofo kiujn li aĉetis hiere* estas esprimoj kies sintaksaj strukturoj estas tute malsamaj, kaj tial netaŭgaj por provi tiri el ili ian kontrastan konkludon rilate la uzadon de la prepozicio *da*.

-- Laŭ la vidpunkto de PAG/PIV, kio tie ĉi gravas estas la kontrasto inter esprimoj kiel tiuj ĉi-apudaj.

(Vidu la tujsekvan (8.11)).

- *Li aĉetis du metrojn da ŝtofo*
- *Li aĉetis du metrojn ĉ da? / ĉ de/el? tiu ĉi ŝtofo.*
- *Li aĉetis du metrojn ĉ da? / ĉ de/el? la ŝtofo kiun mi apene ŝatas.*

(8.11) Ĉi sekcio estas rekta pluigo de (8.10) (tiel ke ili ambaj kune formas un solan sekcion):

(a) El la konstato pri [[la plej ofte doniĝanta]] nedifiniteco [[de la nomoj post *da*]] en la ekzemploj (2.a), plimulto *da niaj* gramatikistoj [{"plimulto *de/el niaj* gramatikistoj"} laŭ PAG/PIV]] tiras eraran konkludon, ke la prepozicion *da* oni ne uzu antaŭ determiniloj ("antaŭ la artikolo *la*, antaŭ la demonstrativaj aŭ posedaj adjektivoj", laŭ PV)

(b) Tiu tabuo [[!]] sekvas el konfuzo inter nedifinita parto entenata (prave) kaj la tuto el kiu tiu parto estas ĉerpita (erare: la tuto ja eventuale povas esti difine determinita).

- *Kvar metroj da ĉi tiu ŝtofo kostas naŭ frankojn.* (EKZ). (Vidu (5.8.7)).
- *Ekzistas cetere multe da miaj verkoj.* (Rev) (Vidu (3.1)).
- *Estas multe da ni kaj da niaj filoj kaj filinoj.* (Bib) (Vidu (5.8.13)).

-- 🍷 Ni komencu pri **(b)**: [[Ambaj

- | | |
|-----------------------------|--|
| • <i>lom da lakto.</i> | • <i>lom ĉ da? / ĉ de/el? tiu ĉi lakto.</i> |
| • <i>Un litro da lakto.</i> | • <i>Un litro ĉ da? / ĉ de/el? tiu ĉi lakto.</i> |

ties partoj estas nekompreneblaj al

mi, ĉar tiel la entenata parto kiel la entenanta tuto povas esti jen nedifinitaj, jen difinitaj]].

[[Jen ni ree venas al la temo, ke la sola problemo tie ĉi doniĝanta estas, 'ĉu oni uzu aŭ ne uzu la saman prepozicion antaŭ nedifinita tuto kiel antaŭ difinita tuto]].

-- Pri la una ĉelo **(a)**: [[Se PAG/PIV pravas en siaj asertoj]], jen ni havas, ke en la procezo kies fina rezulto estis la starigo de tiu "tute certa regulo" (vidu (5.8.12)), ja ne temis pri "tirado de konkludo(j)" surbaze de iaj jam ekzistantaj principoj aŭ aksiomoj, sed pri evoluo survoje al uniformeco de uzado [[kaj al nuancigo de la parolo]].

[[La facilflua epiteto "erara" povus esti eventuale aplikata (pere de adekvata pruvo) al "konkludo", sed estas sence ĝin apliki al "rezulto de evoluo", ĉar en rilato al tiu rezulto oni povas argumenti (eventuale, pruvi), nur pri (mal)utileco, (ne)konveneco, ktp]].

-- [[Krome: Ja ne damaĝus, se RV eksplice dirus, ke en tiu "plimulto *da/de niaj* gramatikistoj" membras Zamenhof mem (sufiĉas trastudi lian LR.16), Kalocsay kaj Waringhien (la aŭtoroj de PAG, la dua anke ĉefa aŭtoro de PIV), kaj anke (se juĝi laŭ tio dirita pri ĝi en Vikipedio) la brita pastraro kiu redaktis BibX surbaze de Bib]].

-- [[Kaj pri la tria ĉelo: Nun RV ne ripetas la vorton "kontraŭekzemploj", sed ĝi revenas al la procedo uzata en (8.9)[vii], nome: Al selektado ekzemplojn taŭgajn por kontribui al la pelmelo, dume saĝe forgesante pri la abundaj kontraŭ-kontraŭekzemploj]].•

(8.12) Jen ni venas al la lasta parto kiun ni studas de la RV-artikolo pri *da*:

[a] En E estiĝis la tradicio ne uzi la artikolon post la prepozicio *da*, tiel ke esceptaj esprimoj kiel tiu ĉi-apuda, kvankam logikaj, impresas strange.

• *Dogeno redonis al la rivero duonon da la akvo ĉerpita.* (Int)

[[*duonon de la akvo ĉerpita* laŭ PAG/PIV]]

[b] Tiu tradicio estas sekvo de iom malsama meĥanismo de determinado ĉe (2.a) kaj (2.b) (samkiel oni ne uzas la akuzativan finaĵon por la pronomo „unu“, kie la logiko postulus la formon „unun“).

[c] Normale oni senhezite uzas post *da* ĉian plensencan determinilon [[ĉiu(j), tuta, montraĵ, posedaj kaj nombraj pronomoj aŭ adjektivoj]], sed ne la artikolon (samkiel oni povas diri "mia amiko", "iu mia amiko", "ĉi tiu mia amiko" - sed ne "la mia amiko").

-- [[Kaj jen miaj komentoj]]:

• 🍌 Ja bonus, ke RV informus, ke tia "tradicio" havas *argumentitan* bazon jam almenaŭ en LR.16. (Vidu (4.2.10)).

• Pri tiu memfida "kvankam logikaj" en [a], jen oni rajtas demandi, *ĉu laŭ 'kiu logiko?*

• La argumentoj pere de *unu / unun, mia amiko* k.s. estas nenidiraj en ĉi kunteksto.

• 🍌 [[Anstat provi argumenti per tiaj nenidiraj esprimoj aŭ per aprioraj principoj, kiel anke per parolo pri [[tolerata]] tradicio, jen pliafoje oportunos, ke RV citus almenaŭ el LR.16, kaj malvolvus mem (kun akcepto aŭ kun motivita rifuzo) pri la lingvaj nuancoj kaj argumentoj sur kiuj baziĝas tiu "ĉar" de Z.]].

La esprimo *dum la frua parto da la jaro* ŝajnas al mi malbona, mi preferas *dum la frua parto de la jaro* ĉar...
signifas ne mezuron, sed nur limigitan apartaĵon ...
 difinitan limigitan apartaĵon ... speciale montrita parto...
peco da viando = peco da ia viando
peco de la viando, kiun mi havas antaŭ mi. (LR.16)

-- [[Kiel jam plurfoje dirite, jen estas surprize, ke anke PAG/PIV nenion eksplican diras pri tiu LR.16, kvankam ĝin implice preske plene akceptas kaj ĝeneraligas]].

• 🍌 Tiu "Normale oni senhezite uzas..." ja estas surpriza aserto, unaflanke ĉar tiu "oni" povas rilati nur al la partianoj de la RV-uzado, sed certe ne al la partianoj de la uzado laŭ LR.16 kaj PAG/PIV, kaj duaflanke ĉar normaleco povus doniĝi kadre nur de RV (?).•

.....

(8.13) [[Kolofone al la artikolo pri *da* en RV]]:

(a) El https://eo.wikipedia.org/wiki/Reta_Vortaro: "Dum PIV certagrade celas preskribon de la lingvouzado, Revo pli orientiĝas al ĝia priskribo".

☛ (b) [[Nu, sendepende de ĉia konsidero pri (ne)akceptindeco de la normoj en la RV-artikolo pri *da*, jen okazas, ke en tiu artikolo RV certe neniel celas preskribon pri la fakta lingvo, sed prezentas nur plej rigidajn preskribajn normojn (sisteme kaj eksplike kontraŭajn al respondaj normoj de PAG/PIV), krome baziĝantajn sur propraj aprioraj principoj, krome prezentatajn per tono de dogmeska aŭtoritato. Kaj, plu krome, el la aŭtoritataj fontoj zorge selektante nur ekzemplojn laŭajn al la propra konceptado (kun grava rolo de la "kontraŭekzemploj" malfavoraj al PAG/PIV), kaj egale zorge evitante ĉian "kontraŭ-kontraŭekzemplon" favoran al PAG/PIV]].

(9) Ni venas al tiuj "Glaso *kun* vino" kaj "Skatolo *kun* bombonoj" cititaj en (2.4.1)[iii] kaj en (8.1):

-- Ŝajne, tiaj konstruoj aperas malofte en niaj tradiciaj fontoj, sed ili tre abundas, ekzemple, en Interreto. (Ili ja estas ofte uzataj almenaŭ anke en H).

Jen du Z. ekzemploj pri tiaj konstruoj.

- *Pladoj kun fiŝoj estis metitaj sur la tablon. (Z.)*
- *Kaj ŝi malfermis felsakon kun lakto kaj donis al li por trinki. (Bib).*

Rim.– [[Oni povus pli-malpli sinonime diri "Pladoj *da* fiŝoj", sed "Felsako *da* lakto" signifas "sako+sakpleno da lakto", dum "Felsako kun lakto" simple signifas "sako+ia kvanto da lakto" (do, ne nepre plena)].•

-- Kaj el *Interreto*:

- *Antaŭ ol dormi ŝi deprenas ĝin [sian falsan dentaron] kaj lasas en glaso kun akvo.*
- *Botelo kun linimento kontraŭ reŭmatismo.*
- *Skatolo kun 24 diverskoloraj kraĵoj.*
- *Telero kun rizo kaj salato.*
- *Solvu pecon da borakso en botelo kun iom da akvo.*

-- Aliaj aferoj:

- *Telero kun (gravurita) bildo de la kastelo.*
- *Viando kun terpomoj.*
- *Mi manĝis viandon kun terpomoj = Mi manĝis (viandon kun terpomoj).*

-- Mikse:

- *Sur la tablo vidiĝas telero kun (viando kun terpomoj).*
- *Mi manĝis teleron da (viando kun terpomoj).*
- *Mi manĝis viandon kun terpomoj, el telero, per tranĉilo kaj forko.*

-- Kontraste al tio, ke oni povas diri –kaj fakte diras– *Mi trinkis botelon da vino* (= *Mi trinkis botelplenan da vino*), jen oni apene dirus *Mi trinkis botelon kun vino*, *Mi manĝis teleron kun viando*, *Mi manĝis teleron kun viando kun terpomoj*, ĉar tio propre signifus, ke mi trinkis anke la botelon kaj manĝis anke la teleron, la ujon.

Tiukaze oni dirus *Mi trinkis (plenan aŭ neplenan) botelon da vino*, *Mi trinkis vinon el botelo*, k.s.

-- [[Oni ja diras "Botelo *kun* iom *da* akvo", "Skatolo *kun* multe *da* bombonoj", sed oni apene dirus **Botelo da iom da akvo**, **Skatolo da multe da bombonoj**]].

(9.1) [[Kvankam parolo estas afero alia ol matematika logikumado, jen estas tamen konstateblaj nerigidaj diferencoj inter tiaj konstruoj kun *da* kaj kun *kun*, kiel en jenaj ekzemploj]]:

- *Glaso da vino* (eĉ en frazo *Mi mendis glason da vino*) ĉefe estas *vino*, krome entenata en *glaso*. Kaj ĝenerale temas pri plena glaso, aŭ laŭ kutima kvanto *da* vino por oportuna trinkado. (En "Botelo *da* vino" principe temas pri plena botelo).

- "Glaso *kun* vino" ĉefe estas glaso, kiu krome entenas ian kvanton *da* vino.

Rim.– Jen ni pliafoje konstatas, ke *da* estas speciala prepozicio, tiel laŭ vidpunkto de semantiko kiel de sintakso, tiel ke ĝi per si sola konsistigas un prepozici-specon, oponan al dua speco konsistanta el ĉiuj ceteraj prepozicioj *kun*, *de*, *el*, *pri*, ktp. (Vidu (5.2)).•

(10) Pri *de* en RV.

-- El la diversaj sekcioj temantaj en RV pri la plursignifa *de* ni atentis nur tiun plej rilatan al la jam traktita *da*:

[9] Frazoj en kiuj la prepozicio *de* esprimas rilaton inter du substantivoj, el kiuj la determinanto [[=la suplemento venanta post *de*]] montras la konsiston aŭ la mezuron de la determinato:

- *Monsumo de mil pundoj, Alto de dudek metroj, Aĝo de okdek jaroj* (Bib), *Vojo de tri tagoj en la dezerton* (Bib).
- *Popola kutimo havas valoron de leĝo*. (PE).
- *Taĉmento de soldatoj*. (Fa). (Oni povus diri *el soldatoj*).– (Malsame al *da soldatoj*).
- *En la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis du pafojn*. (EKZ)
- *Amaso da mono kaj titolo de barono*. (PE)

(11) El la anglalingva <https://en.wiktionary.org/wiki/da>

-- Rilate lingvo-uzadon de *de/da* ĝi plene koincidas kun RV.

Nu, ni traktas nur jenajn tri erojn ĝiajn:

(a) Etimologio de *da*: El F *de*, It *di*, modifitaj por diferencigi *da* disde *de*.

-- [[Nu, tio eventuale povas esti la etimologio de la formo *da*, sed ne la etimologio de ĝia signifo/rolo]]. [[Cetere, ŝajne, Z. ne sciis pri It]].

(b) Kelkaj E-vortaroj anstatis la esprimojn *listo da* kaj *tuto da* per *listo de* kaj *tuto de*.– Tio ĉi estas eraro, pro influo de okcidentaj lingvoj ne posedantaj ekvivalenton de *da*.

[[Laŭ mia kompreno, jen la dua parto de ĉi citaĵo inkludas almenaŭ jenajn erojn]]:

- Ke ekzistas certaj ne-okcidentaj lingvoj posedantaj ekzaktan aŭ proksimuman ekvivalenton de *da*.

- Ke Z. uzas *da* ĝuste laŭ tiuj lingvoj [[?]] (jen ĉar li tion konscie imitis kvankam li neniam parolis pri tia afero, aŭ jen ĉar tiu prepozicio estas originala ideo lia, tiel ke sen scio pri tiuj lingvoj jen li venis al koincido kun ili).

- Ke la aŭtoroj de ĉi web-paĝo bone scias pri tiuj lingvoj kaj pri la funkciado de la respektivaj prepozicioj, kaj ke ĝuste tian funkciadon ili prezentas en siaj verkoj.

- Ke tio de ili prezentata estu la normo por E.

-- 🍌 [[Nu, almenaŭ unu afero estas klara: Jen la aŭtoroj de tiu paĝo devus bonkori al ni, nin informante pri la nomoj de tiuj lingvoj, ke ni povu detale informiĝi pri la afero, kaj tial eventuale veni al opinio, 'ĉu Z. konis iu(j)n el tiuj lingvoj kaj ilin imitis, aŭ 'ĉu li ilin ne konis, tiel ke tiu *da* estas originala ideo lia kaj kiu, sen lia scio, venis al koincido kun aliaj lingvoj]].

-- [[Krome: Jen ree aperas la vorto "eraro" (egale facilflua kiel en sia unu apero, kaj egale kaj samkaŭze senseca), kvankam "eraro" povus doniĝi nur en rilato al la oficialaj gvidiloj pri la lingvo E (nome, antaŭ ĉio, la *Fundamento de Esperanto*, kaj tion sekvas la *Decidoj kaj Rekomendoj de la Akademio de Esperanto*; kaj ne-oficiala sed grava gvidilo ja estas anke la *Lingvaj Respondoj*]].

[[Se tiaj ne-okcidentaj lingvoj ekzistas, jen tamen oni neniel povus, do, argumenti pere de ili en rilato al E, kvankam oni eventuale povus tiri el ili kelkajn aŭ multajn instruojn utilajn por E, kaj oni tial povus surbaze de ili des pli firme pledi por difinitaj lingvo-uzoj –ja tamen kun eksplica indiko pri la koncernaj faktoj en tiuj lingvoj]].

(c) [[El la ekzemploj en ĉi web-paĝo]]:

- *Listo da kandidatoj* – a list *of* candidates (of their names: compare ...
- *Listo da kondiĉoj de la kandidatoj* – a list of conditions from the candidates).

-- Nu: Antaŭ 2-3 tagoj, en la hispana TV oni informis, ke 116.000 personoj estas kandidatoj en publika konkurso ofertanta 2.295 laborpostenojn, kaj tio sugestis jenan frazon al mi (redaktita laŭ la instruoj de PAG/PIV):

- [[Sur la afixtabulo montriis $\left\{ \begin{array}{l} \textit{la listo de la kandidatoj} \\ \textit{la listo de la nomoj de la kandidatoj} \end{array} \right.$ al tiuj administraciaj postenoj, kaj Oskar, hororigita de tia longega listo *da* kandidatoj, decidis ne prezenti sin al la koncernaj ekzamenoj]]. [[Kaj oni povus diri anke ... *la listo pri la nomoj de la kandidatoj*]].

[[Laŭ mia kompreno, tiu frazo ĝuste kaj suke esprimas la nuancojn doniĝantajn en tia situacio]].

[[Kaj se mi bone komprenas la ekzemplon en la web-paĝo, jen laŭ ĝi tiu frazo devas esti]]:

- [[Sur la afixtabulo montriis $\left\{ \begin{array}{l} \textit{la listo da kandidatoj} \\ \textit{la listo da nomoj de la kandidatoj} \end{array} \right.$...
... *tia longega listo da kandidatoj*...]]

[[Nu, oni ja povas tiel paroli, kaj oni estus egale bone komprenata sed –almenaŭ, laŭ mia kompreno– jen ĉi dua alternativo estas malpli nuancita ol la antaŭa, jene]]:

- [[La suplemento *kandidatoj* en la esprimo *longega listo da kandidatoj* en la lasta parto de ambaj alternativoj enhavas pli-malpli klare la nuancon pri nedifinita tuto *longega listo da iaj kandidatoj* (LR.16), kaj tia estas la afero konsiderata/konsiderenda en tiu parto de la ekzemploj, ja sendepende de tio, 'kiuj efektive estas la kandidatoj]].

• [[Sed en la una parto de la dua alternativo, jen *la listo da iaj kandidatoj, la listo da iaj nomoj de la kandidatoj* ja estas vere krudaj esprimoj, eĉ sensecaj]].

• [[Evidente, oni ja povas opinii, ke tia nuanco-distingado laŭ LR.16 kaj PAG/PIV estas nura harfendado, kaj oni povas kaj rajtas pledi por plena forlasado ĝin]].

[[Sed tian pledon oni bonvolu fari pere de argumentoj kadre de E propra, kaj ne per facilflua parolo pri eraro pro nesciado pri iuj feliĉaj lingvoj posedantaj ekvivalenton de *da* (lingvoj kies nomojn, cetere, oni ial tenas sekretaj)]]].

.....

☞ **(11.1)** La web-paĝo ĵus komentita enfermas plian eron kiun kadre de mia nivelo de ordinara parolanto mi povas nur citi, sed ne malvolvi: Se la semantiko de la vorto "listo" trudas, ke post ĝi oni ĉiukaze uzu *da*, ĉu ĉi tiam ĉe tia semantiko jen *da* iĝas rednda, superflua por la lingvo, ĉar uzante la ĝeneralan prepozicion *de* oni venus al ekzakte la sama informo?. (Vidu (8.9)(iii) kaj (8.8)).

(12) Jen ni venas al la lasta sekcio de ĉi paĝaro:

Pri *da* en Vikipedio, [https://eo.wikipedia.org/wiki/Da_\(prepozicio\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Da_(prepozicio))

-- Jen ni studas pri la ĉefaj unopaj eroj de ĉi web-paĝo:

(a) *Da* estas prepozicio kiu kaŭzas problemojn por multaj okcidentanoj.

[[En (2)[iii] mi jam diris mian opinion, ke *da* fakte estas kaprompa prepozicio. Sed mi ja ne kompetentas diri, ĉu ĝi estas kaprompa nur por multaj okcidentanoj, kvankam mi preske certas, ke ĝi estas tia por ĉiaj lingvanoj, eĉ se, probable, ne por ĉiuj temas pri la samaj problemoj]].

(b) *Da* inhibicias la artikolon *la*.

[[Jen vere klera kaj klara alternativa maniero diri, ke en RV la kombinaĵo *da la* estas [[tolerata]] ĉar ĝi fariĝis tradicia en E]]. (Vidu (8.11)).

(c) En la vortuzo de Zamenhof, la antaŭa nomo [[= tiu antaŭ *da*]] ne estas nepre nedifinita, spite de la difinoj de *da* en la *Plena Ilustrita Vortaro*, la *Plena Analiza Gramatiko*, kaj la *Enciklopedio de Esperanto*.

[[Laŭ mia kompreno, per tio oni asertas, ke laŭ PIV, PAG kaj EdE, jen la nomo antaŭ *da* estu nepre nedifinita]].

[[Nu, mi ne scias, el 'kie oni prenis tion, ĉar jen la faktaj difinoj]]:

• PAG, 133.H: "*Da*, proprasence, do servas por rilatigi substantivojn aŭ kvazaŭsubstantivojn kiuj esprimas pli malpli difinitan kvanton, nombron, grandon, pezon, kun ilia suplemento esprimanta la nedifinitan tuton el kiu oni prenas tiun kvanton, nombron, grandon, ktp".

• PIV: "*da*. Prep. uzata por rilatigi du vortojn aŭ sintagmojn, el kiuj la una esprimas mezuron (kvanton, pezon, longon, volumenon k.a.) de la dua".

• [[Krome, ĉi surpriza aserto [c] estas nura variaĵo de tiu egale surpriza pri la tabuo en (8.11)[b] (tiel ke oni povus ripeti tie ĉi la tieajn klarigajn ekzemplojn]].

-- [[Plu krome, en la amaso da ekzemploj en (5.8) ja ekzistas ekzemploj en kiuj la nomo antaŭ *da* estas jen difinita, jen nedifinita, jen pli-malpli difinita]].

(d) Laŭ la Plena Vortaro de Esperanto, *da* estas "uzata por rilatigi kun iliaj komplementoj la vortojn, kiuj esprimas precizan au neprecizan kvanton, nombron, mezuron, pezon".

[[Mi ne disponas tiun malnovan vortaron, kaj tial ne povas kontroli mem]].

[[Tamen, jen ni havas plian surprizan aserton, ĉar tiu preskribo estas ekzakte tiu, laŭ kiu RV difinas la signifon de *da* en la baza kazo (2). (Vidu ĵus antaŭ (8.3))]].

(e) La *Plena Ilustrita Vortaro* plue diras, ke tiu kvanto ktp [[tiu venanta post *da*]] estas "ĉiam nedifinita".

Tio ĉi estas "citaĵo el memoro". Vidu en (8.9)(b) la ekzaktan tekston: "La substantivo kiu venas post *da*, ne povas mem esprimi precizan kvanton".

Nu, ĉar al mi ne estas klare, 'ĉu en tiu citaĵo el memoro ekzistas aŭ ne ekzistas konfuzo inter kaŭzo kaj efiko, jen ni provu meti la aferon klara: Laŭ PAG/PIV ja ne temas pri tio, ke *da* trudus signifon de nedefiniteco al la suplemento, sed, male, un el la kondiĉoj por ĝusta uzado de *da* estas, ke la suplemento havu signifon de nedifinita tuto. (Vidu (5.8.2)).

[f] ... sed ... tio estas eraro ... malgraŭ ke *da* inhibicias la artikolon, ĝi akceptas sencon difinitan, kiel en ...

• *Li ligis la tri florojn en bukedon, kaj prezentis al ŝi tiun bukedon da floroj.*

[[Ni preteratentu la rean aperon de la facilflua "eraro" kaj "inhibicio"]].

[[Nu, mi certas ke, en vera ordinara parolo fremda al gramatikumaj celoj, jen ni ĉiuj uzus la unan ĉi-sekvan propozicion, aŭ, malpli ofte, la duan propozicion, sed ja ne la ceterajn alternativojn, ĉar la kerna celo de la prezento ja estas prezenti bukedon]]:

• [[*Li ligis la tri florojn en bukedon, kaj prezentis al ŝi tiun bukedon*]],
tiun florbukedon.
tiun bukedon de floroj.
tiun bukedon el floroj.
**tiun bukedon da floroj* (= ... da iaj floroj).*

[[La trian kaj kvaran alternativon oni apene uzus ĉar ili estas stile pli pezaj ol la du antaŭaj]].

[[Kaj per la kvina alternativo ni venus al esprimo tute analoga laŭ lingva krudeco al la ekzemplo pri la kandidatoj en (11.c)]. [[Kaj, egale kiel tie dirite, oni ja povas, tamen, tiel paroli se oni tiel volas, kaj anke eĉ pledi por malapero de la vorto *florbukedo* kaj de ĉiuj vortoj al ĝi analogaj]].

[[Sed ni nin tenu al la gramatikista tono de la web-paĝo]]:

(α) [[Oni agnoskas, ke en la propozicio *kaj (li) prezentis al ŝi tiun bukedon da floroj*, se izolita, jen tiu suplemento *floroj* havas nedifinitan sencon]]. [[Tio ĉi ja laŭas la normojn de LR.16 kaj PAG/PIV]].

(β) [[Oni asertas, ke pro kunligado kun tiu alia propozicio *Li ligis la tri [[difinitajn]] florojn en bukedon*, jen la suplemento *floroj* en *bukedo da floroj* akiras mem difinitan sencon]].

(γ) [[Nu, eĉ ĉe supozo ke tia aserto **(β)** estus prava laŭ ia konceptado [[?]], jen temas tamen pri gapiga aserto, ĉar tio estas afero absolute fremda al la normoj de LR.16 kaj PAG/PIV, laŭ

kiuj la senco difinita aŭ nedifinita de la suplemento dependas nur de la strukturo/konsisto de la suplemento mem, ja ne de io ajn ekstera al la suplemento]].

Por pli da klareco: Jen ĉi-
apude ekzemploj el (4.3.3),

- [[(La du funtoj **da** (ia) viando) (**kiujn** mi havas antaŭ mi)]]
- [[(La du funtoj) **de/el** (la viando **kiun** mi havas antaŭ mi)]]

pri suplementoj kun signifo de nedifinita kaj de difinita tutaj.

(ĝ) [[Konklude: Kadre de la direktaj LR.16 kaj PAG/PIV okazas ke, tiel kun la alpendaĵo *Li ligis...*, kiel sen ĝi, jen en tiu kruda *bukedo da floroj* la suplemento *floroj* estas nedifinita]].

(g) La problemo estas, ke vorto kiel **da** ne troviĝas en okcidentaj lingvoj, kaj do okcidentanoj ofte ne bone komprenas la vortuzon de Zamenhof.

[[Nu, ree ne atentante pri (ne)akceptindeco de iuj aŭ aliaj normoj, ree ne atentante ke oni insistas gardi sekretaj la nomojn de la feliĉaj ne-okcidentaj lingvoj disponantaj ekvivalentojn por **da**, ree ne atentante la tedan rekantaĵon de la angla paĝo pri eraro...

... jen tamen oni ne povas ne
atenti, ke oni asertas, ke ne nur
Kalocsay,

Waringhien, la brita pastraro de
BibX, Bein, Stojan, ktp ne bone

komprenis la vortuzon de
Zamenhof,

sed eĉ ke Zamenhof mem ne bone
komprenis sin mem verkante sian kompleksan kaj [[longe pripensitan]] LR.16]].

La esprimo *dum la frua parto da la jaro* ŝajnas al mi
malbona, mi preferas *dum la frua parto de la jaro* ĉar...

...signifas ne mezuron, sed nur limigitan apartaĵon ...
difinitan limigitan apartaĵon ... speciale montrita parto...

peco da viando = *peco da ia viando*

peco de la viando, kiun mi havas antaŭ mi. (LR.16)

👉 [[Nu, tio estas ekscese facilflua kaj ekscese dogmeska aserto]].

(13) Kolofone pri ĉi paĝaro.

(a) Mi opinias ke, tra la tuto de ĉi tede detaloza paĝaro, mi sukcesis fidele ĉerpi pri normoj kaj ekzemplaj frazoj el niaj fontoj, kiel anke min tenadi en miaj komentoj al mia nivelo de ordinara parolanto.

(b) Jen aldono al mia malnova opinio laŭ (2)(iii): Mi opinias anke, ke plejparto de tiu ĉi paĝaro estas nura monstreto amaso da trivialaĵoj.

(c) Kaj mi rezignu mergiĝi en pli profundajn pensojn.....

A.A.N. – Ceuta (Hispanio) – Oktobre, 2018.

=====
=====
=====

